JARFINO 2001

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

# La Espero

2001:5-6

# 20 paĝoj da legaĵoj por la jarfinaj tagoj



## LA ESPERO

***Organ för Svenska Esperantoförbundet***

ISSN 0014–0694
Jarfino 2001 • 89-a jarkolekto
Fondita en 1913

**Redaktion:**
saknas
Detta nummer redigerat av Franko Luin

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08–34 08 00

**E-post:** *espero@esperanto.se*

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi, Tyresö

**Tryck:** HA Reklamtryck, Stockholm

**Prenumeration 2001:** 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08–34 08 00

**E-post:** *sef@esperanto.se*
**Nätsida:** *www.esperanto.se*

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2001:**
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 – 34 08 00

**Fax:** 08 – 34 08 10

**Postgiro:** 578–5

**Nätsida:** *www.esperanto.se/eldona*

**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Ole Hansen


***Manusstopp den 20/1 2001***

**Manus till La Espero**
**sänds till Leif Nordenstorm**
**Järnvägsgränd 11**
**961 76 Boden**
***tel.* 0921-123 54**
***e-post:* nordenstorm@hem.utfors.se**

*La Espero* estas presata sur recikligita papero.

## NI PREZENTAS

# Leif, (mal)nova redaktoro



En *La Espero* 1993:1 mi legas, ke la tiama redaktoro sentis, ke li bezonas paŭzon, ĉar li havas tri infanojn. Nun la infanoj fariĝis kvin, sed la paŭzo fariĝis sufiĉe granda kaj la malnova redaktoro de *La Espero*, povos denove fariĝi redaktoro. La nomo de la malnova redaktoro estas Leif Nordenstorm.

Mi naskiĝis en Kiruna en 1960. En 1974 mi trovis malnovan lernolibron pri Esperanto en la urba biblioteko de Kiruna kaj komencis lerni la lingvon sola. Mia unua interparolo en Esperanto estis kiam Guy Coste, tiam Skellefteå-ano, telefonis al mi por instigi min paroli Esperanton. Post kelkaj jaroj mi komencis viziti kongresojn. Mi redaktis sinsekve *ktp*-n (revuo de SEJU), *Kontakto*-n kaj *La Esperon* dum la periodo 1979-1993. Mi dum miaj studentaj jaroj estis membro de Esperanto-Societo de Upsalo.

Mi nun loĝas en Boden, kie mi estas parohestro. Apud la laboro mi verkas doktoran disertacion pri "Oomoto kaj Esperanto". Pri tio mi skribos aliloke en *La Espero.*

Mi uzis Esperanton dum 27 el miaj 41 jaroj. Dum tiuj jaroj mi komprenеble klopodis propagandi Esperanton. Se oni atendas tujan venkon de Esperanto, oni tamen verŝajne iam elreviĝos, sed oni devas ne forgesi, ke dum multaj jarcentoj nur malmultaj homoj estis certaj, ke la mondo estas globforma, kaj ne plata, kaj nur post multe da tempo ĉiuj akceptis tiun ideon. Same ŝajnas ke oni bezonas multe da tempo por konscii la homaron, ke Esperanto estas la plej bona solvo de la monda lingvoproblemo.

Ĝis iama venko de Esperanto oni tamen havas eblecon uzi la lingvon. Por ni esperantistoj estas granda avantaĝo, ke ni povas renkonti esperantistojn en ĉiuj landoj. Ni vojaĝas ne nur kiel turistoj, sed ni jam havas amikojn en ĉiuj landoj. Tio ne estas troigo sed vero! Tial mi vere ĝojas ke mi hazarde trovis tiun lernolibron en 1974.

Ekde la jarkolekto 2002 mi denove redaktos *La Esperon*. Mi redaktos ĝin kun la helpo de la legantoj. Tio signifas, ke la helpo de la leganto estas kaj bonvena kaj necesa.

**Leif Nordenstorm**

*La estraro de SEF volas kore danki al Jan Setréus, la ĝisnuna redaktoro de* La Espero, *por lia sindona laboro kaj la pacienco montrita. Ni kun ĝojo atendas ankaŭ estonte artikolojn liaflanke pri temoj, kiuj interesas kaj lin kaj niajn membrojn.*

# La fantomo de Marley

*Ni enkondukas ĉi tiun specialan numeron de* La Espero, *aperanta ĉirkaŭ kristnasko, per klasika kristnaska rakonto:* Kristnaska kanto *(A Christmas Carol) de Charles Dickens. La origina traduko aperis jam en 1905. Ĉi tiun version lingve reviziis Margaret Munrow en la jaro 2000.*

Por komenci: Marley mortis. Ne estis dubo pri tio. La protokolo pri lia enterigo estis subskribita de la pastro, la aktisto, la ĉerkfaristo kaj la ĉeffunebranto. Scrooge ĝin subskribis. Kaj la nomo Scrooge estis alte taksata en la borso, pri ĉiuj aferoj, kiujn li entreprenis.

Maljuna Marley estis morta kiel porda najlo.

Notu! Mi ne volas diri, ke mi mem scias, kial porda najlo speciale estas morta. Koncerne min, mi rigardas ĉerkonajlon kiel la plej senvivan pecon feran en la komerco. Sed en tia komparo kuŝas la saĝeco de niaj prapatroj; kaj miaj manoj ĝin ne disrompos. Permesu do al mi ripeti, kun aplombo, ke Marley estis same morta kiel porda najlo.

Ĉu Scrooge sciis, ke li mortis? Kompreneble. Kiel povus esti alimaniere? Scrooge kaj li estis kunuloj dum mi ne scias kiom da jaroj. Scrooge estis lia sola plenumanto, lia sola kuratoro, lia sola rajtigito, lia sola heredanto, lia sola amiko kaj sola funebranto. Sed eĉ Scrooge ne estis tiom malĝojanta, ke li ne negocis lerte en la tago de la enterigo, kaj ke li ne ĝin solenigis per komerca faro sendube profita. Menciinte la enterigiron de Marley, mi revenas tien, kie mi komencis. Sendube Marley mortis. Tio ĉi devas esti plene komprenata, aŭ en la rakonto kiun mi estas faronta estos nenio mirinda. Se ni ne estus absolute konvinkitaj, ke la patro de Hamleto mortis antaŭ la komenco de la teatraĵo, ne estus io pli rimarkinda pri liaj noktaj promenoj sur la propraj muregoj en la vento orienta, ol estus pri ajna sinjoro mezaĝa, malprudente iranta nokte en venta loko — ekzemple la preĝeja korto de Sankta Paŭlo — por mirigi la cerbon malfortan de sia filo.

Scrooge neniam forstrekis la nomon de maljuna Marley. Tie ĝi restis, multajn jarojn poste, super la pordo de la tenejo: Scrooge kaj Marley. La firmo estis konata kiel "Scrooge kaj Marley". Kelkfoje novaj homoj nomis Scrooge Scrooge kaj kelkfoje Marley, sed li respondis al ambaŭ nomoj. Por li estis tute same.

Ho! Sed li estis avarega, Scrooge! premema, altirema, skrapema, kaptema, avida, maljuna pekulo! Malmola kaj akra kiel siliko, el kiu neniam ŝtalaĵo elsaltigis fajreron malavaran; sekreta kaj silentema, kaj sola kiel ostro. La malvarmeco en li glaciigis liajn trajtojn maljunajn, pinĉis lian nazon pintan, sulkigis lian vangon, rigidigis lian iradon; ĝi ruĝigis liajn okulojn, bluigis liajn lipojn malgrasajn; kaj li parolis per voĉo raspanta. Lia hararo kaj ankaŭ liaj brovo kaj forta mentono estis kvazaŭ frost-kovritaj. Ĉiam li kunportis sian malaltan temperaturon; li glaciigis sian oficejon somermeze; kaj li ĝin ne malfrostigis eĉ per unu grado je kristnasko.

Varmo kaj malvarmo eksteraj malmulte influis al Scrooge. Neniu varmo lin povis varmigi, neniu vetero vintra lin malvarmigi. Neniu vento estis pli akra ol li, neniu neĝo falanta estis pli obstina pri sia celo, nenia pluvo verŝiĝanta pli senpardona. Malbona vetero ne sciis kiel trakti lin. Pluvo, hajlneĝo, neĝo, hajlo, kiom ajn abundaj, povis fanfaroni nur pri unu supereco super li. Ili ofte bele aspektis, dum Scrooge neniam faris tion.

Neniu lin haltigis sur la strato por diri ĝentile: "Mia kara Scrooge, kiel vi fartas? Kiam vi vizitos min?" Neniam almozulo lin petis, ke li donacu ion, neniam infanoj lin demandis pri horo, neniu viro aŭ virino iam ajn en lia tuta vivo demandis al Scrooge pri la vojo. Eĉ la hundoj de la blinduloj ŝajnis lin koni, kaj kiam ili vidis lin alvenanta, ili tiris siajn mastrojn sub la pord-arkojn kaj en stratetojn, kaj tiam ili svingis siajn vostojn kvazaŭ dirante "Neniu okulo estas pli bona ol okulo malbona, mastro senvida!"

Sed Scrooge fajfis je tio! Ĝuste tion li ŝatis. Borderi laŭ la vojoj plenplenaj de la vivo, forpuŝante ĉiaspecan homan simpation, tio estis por Scrooge tre bona afero.

Iun fojon — je kristnaska antaŭvespero, el ĉiuj bonaj tagoj — la maljuna Scrooge sidis okupita en sia kontoro. Estis vetero malvarma kaj mordanta kaj ankaŭ nebula; li povis aŭdi en la korto ekstere personojn irantajn spiregante kaj batante per la manoj sur la brustojn, kaj pied-frapantajn por varmiĝi. Estis nur la tria horo, sed jam tute mallumiĝis — ne estis lume la tutan tagon — kaj kandeloj brilegis en la fenestroj najbaraj kiel makuloj ruĝaj en la densa bruna aero. La nebulo eniris tra ĉiuj fendoj kaj serurtruoj, kaj ekstere ĝi estis tiel densa ke, kvankam la korto estis unu el la plej mallarĝaj, la domoj kontraŭaj ŝajnis nur fantomoj. Vidante la nebulon malhelan malsupreniĝanta, ĉion mallumiganta, oni imagus ke la naturo loĝis tute apude, kaj ke ĝi fabrikis nebulon grandskale.

La pordo de la kontoro de Scrooge estis malfermita, por ke li povu spioni sian komizon, kiu en apuda morna ĉeleto, kvazaŭ cisterno, kopiadis leterojn. Scrooge havis tre malgrandan fajron, sed la fajro de lia komizo estis tiom pli malgranda, ke ĝi aspektis kiel karbero! Sed li ne povis ĝin replenigi, ĉar Scrooge tenis la karbujon en sia propra ĉambro, kaj tuj kiam la komizo envenis kun ŝovelilo, la mastro prognozis, ke ili baldaŭ devos disiĝi. Tial la komizo surmetis sian blankan lanskarpon, kaj penis varmiĝi ĉe la kandelo, sed ne estante imagema, li ne sukcesis.

"Ĝojan kristnaskon, onklo! Dio vin savu!" ekkriis gaja voĉo. Estis la voĉo de la nevo de Scrooge, kaj li tiel rapide venis, ke lia onklo ankoraŭ lin ne vidis.

"Baf!" diris Scrooge. "Sensencaĵo!"

Ĉi tiu nevo de Scrooge tiom varmiĝis, irinte rapide en nebulo kaj frosto, ke li estis tute brilanta; lia vizaĝo estis ruĝa kaj bela; liaj okuloj brilis, kaj lia vaporeca elspiraĵo estis kvazaŭ fumo."Kristnasko sensencaĵo, onklo?" diris la nevo de Scrooge. "Vi ne intencas tion, ĉu?"

"Sed jes," diris Scrooge. "Ĝojan kristnaskon! Kian rajton vi havas esti ĝoja? Kian kaŭzon vi havas esti ĝoja? Vi estas sufiĉe malriĉa."

"Kial, do!" respondis la nevo gaje. "Kian rajton vi havas esti malĝoja? Kian kaŭzon vi havas esti malafabla? Vi estas sufiĉe riĉa."

Scrooge, ne havante pli bonan respondon preta ĝuste tiam, rediris "Baf!" kaj ĝin sekvigis per "Sensencaĵo!"

"Ne estu kolera, onklo," diris la nevo.

"Kio alia mi estu,"respondis la onklo, "kiam mi loĝas en mondo tiel naivega? Ĝojan kristnaskon! For de tie ĉi! Kio estas kristnasko al vi, se ne tempo por ŝuldojn pagi sen mono; okazo por vin trovi unu jaron pli maljuna, kaj ne pli riĉa eĉ je unu horo; okazo por bilanci viajn kalkul-librojn kaj konstati ke ĉiu artikolo tie donis al vi neniun profiton! Se mi povus ĉion arangi," li diris indignante, "ĉiu idioto, kiu vagas dirante 'Ĝojan kristnaskon', devus esti kuirata kun sia propra pudingo, kaj enterigita kun ileksa paliso tra sia koro! Jes, certe!"

"Onklo!" la nevo kriis riproĉe.

"Nevo!" la onklo respondis severege, "ĝuu kristnaskon kiel al vi plaĉas, kaj permesu ke mi ĝuu ĝin laŭ mia gusto."

"Ĝui ĝin," ripetis la nevo de Scrooge – "sed vi ĝin ne ĝuas!"

"Permesu do, ke mi ĝin lasu," diris Scrooge. "Ĝi vin helpu multe! ĉar multe ĝi ĉiam vin helpis!"

"Estas certe multaj aferoj, kiuj povus min esti helpintaj, sed de kiuj mi nenion gajnis, kaj inter tiuj estas kristnasko," respondis la nevo. "Sed ĉiam mi rigardis kristnaskon kiel tempon bonan – la respekto ŝuldata al ĝia sankta nomo kaj deveno aparte – kiel afablan, pardoneman, kaj bonfaradan; kiel la solan tempon en la longa jara kalendaro, kiam homoj ŝajnas unuanime voli malfermi siajn fermitajn korojn libere, kaj pensi pri subuloj kiel veraj kunvojaĝantoj al tombo, kaj ne kiel fremduloj vojaĝantaj alidirekten! Kaj tial, onklo, kvankam ĝi neniam metis ajnan moneron en mian poŝon, mi kredas ke ĝi min helpis kaj min helpos; kaj mi diras, Dio ĝin benu!"

La komizo en la cisterno senvole aplaŭdis. Tuj komprenante la maltaŭgecon, li ektuŝis la fajron kaj estingis por ĉiam la lastan malfortan fajreron.

"Se mi aŭdos de vi unu pluan sonon," diris Scrooge, "vi ĝuos vian kristnaskon perdante vian oficon!" Kaj li aldonis, sin turnante al sia nevo: – "Kiel potenca parolanto vi estas, sinjoro! Mi miras, ke vi ne eniras la parlamenton!"

"Ne koleriĝu, onklo. Venu! Tagmanĝu kun ni morgaŭ."

Scrooge diris, ke li vizitos lin – jes, li diris tion. Li uzis la tutan esprimon kaj diris, ke li vizitos lin en tiu ekstremaĵo unue.

"Sed kial?" kriis la nevo. "Kial?"

"Kial vi edziĝis?" diris Scrooge.

"Ĉar mi enamiĝis!"

"Ĉar vi enamiĝis," blekis Scrooge, kvazaŭ tio estus la sola afero pli ridinda ol ĝoja kristnasko. "Bonan tagon!"

"Ne, onklo, sed antaŭ tio vi neniam vizitis min. Kial vi uzas tion kiel pretekston por ne veni nun?"

"Bonan tagon," diris Scrooge.

"Mi deziras nenion de vi; mi nenion petas de vi. Kial ni ne povas esti amikoj?"

"Bonan tagon," diris Scrooge.

"Mi vere malĝojas, ke mi vin trovas tiel decidita. Neniam estis malpaco inter ni miaflanke. Sed mi faris provon, por honori kristnaskon, kaj mi en humoro kristnaska restos ĝis la fino. Tial, ĝojan kristnaskon, onklo!"

"Bonan tagon," diris Scrooge.

"Kaj feliĉan novjaron!"

"Bonan tagon," diris Scrooge.

Lia nevo foriris tamen sen vorto kolera. Li haltis ĉe la ekstera pordo por bondeziri la komizon, kiu, kvankam malvarma, estis pli varma ol Scrooge, ĉar li resalutis korege.

"Jen alia ulo," murmuris Scrooge, ĉar li lin aŭdis, "mia komizo kun dek kvin ŝilingoj ĉiusemajne, kaj kun edzino kaj familio, babilanta pri ĝoja kristnasko! Mi iros al la frenezulejo en Bedlam."

Tiu ĉi pretendita frenezulo, elkondukinte la nevon de Scrooge, enirigis du aliajn personojn. Ili estis bonkorpaj sinjoroj, kun agrabla aspekto, kaj nun ili staris, senĉapelaj, en la oficejo de Scrooge. Ili tenis en siaj manoj libretojn kaj paperojn, kaj ili salutis.

"Scrooge kaj Marley, mi supozas," diris unu sinjoro rigardante en sian registron. "Ĉu mi havas la plezuron paroli kun sinjoro Scrooge aŭ sinjoro Marley?"

"Sinjoro Marley mortis antaŭ sep jaroj," respondis Scrooge. "Li mortis antaŭ sep jaroj en tiu ĉi nokto."

"Sendube lia kunulo bone kaj malavare reprezentos lin," diris la sinjoro, prezentante rajtigojn oficialajn por kolektado de ofermono.

Sendube tiel estis, ĉar la kunuloj estis estintaj tre similaj. Ĉe la vorto "malavare" Scrooge sulkigis la frunton, skuis la kapon, kaj demetis la oficialan ateston.

"En ĉi tiu festa epoko de la jaro, sinjoro Scrooge," diris la sinjoro kaj prenis plumon, "estas dezirinde pli ol en alia tempo provizi iom por malriĉuloj kiuj suferas multe. Multaj miloj bezonas eĉ necesaĵojn ordinarajn; centmiloj bezonas etajn komfortaĵojn, sinjoro."

"Ĉu ne ekzistas malliberejoj?" demandis Scrooge.

"Multe da malliberejoj," diris la sinjoro kaj demetis la plumon.

"Kaj labordomoj?" demandis Scrooge. "Ĉu ili ankoraŭ bone funkcias?"

"Jes. Ankoraŭ," respondis la sinjoro, "mi preferus diri, ke ili ne funkcias!"

"La trudlaborejoj kaj la leĝoj pri malriĉuloj do plene funkcias?" diris Scrooge.

"Ambaŭ plene funkciantaj, sinjoro."

"Ho! mi timis, laŭ tio kion vi ĵus diris, ke io okazis, kio ilian utilecon malhelpus," diris Scrooge. "Mi tre ĝojas ekscii, ke ne estas tiel."

"Opiniante, ke ili apenaŭ donas al la popolo kontentecon korpan aŭ spiritan, kelkaj el ni penas kolekti monon por aĉeti iom da viando kaj trinkaĵo kaj varmaĵoj por la malriĉuloj. Ni preferas tiun ĉi tempon, ĉar ĝi estas la tempo, kiam precipe la manko multe estas sentata kaj la abundo ĝojas. Kiom vi volas donaci?"

"Nenion," diris Scrooge.

"Ĉu vi volas esti anonima?"

"Mi volas esti sola," diris Scrooge. "Ĉar vi min demandas pri tio, kion mi volas, sinjoroj, jen estas mia respondo. Mi mem ne ĝojas pri kristnasko, kaj mi ne povas doni por ĝojigi mallaboremulojn. Mi helpas subteni la institucioj, kiujn mi ĵus menciis – kaj ili kostas sufiĉe; kaj tien devas iri la malriĉuloj."

"Multaj personoj ne povas iri tien, kaj multaj preferus morti."

"Se ili preferas morti," diris Scrooge, "des pli bone, ĉar tiam ili malkreskigus la loĝantaron tro grandan. Cetere, bonvolu min senkulpigi, mi ne scias tion."

"Sed vi povus facile tion ekscii," rimarkis la sinjoro.

"Ne estas mia afero," respondis Scrooge. "Sufiĉas, ke homo konas siajn proprajn aferojn, kaj ne miksiĝas en la aferojn de aliaj. Miaj plenigas mian tutan tempon. Bonan vesperon, sinjoroj!"

La sinjoroj sentis, ke insistado estus senutila, kaj ili foriris. Scrooge daŭrigis sian laboron kontente, kaj eĉ pli ŝerceme ol kutime.

Dume la nebulo kaj mallumo tiom plidensiĝis, ke homoj vagadis kun brulantaj torĉoj kaj oferis siajn servojn por montri la vojon al personoj erarintaj. Pli nebule ankoraŭ kaj pli malvarme! Malvarmo penetranta, serĉanta, mordanta! Se la bona sankta Dunstan estus pinĉinta la nazon de la fantomo Diabla per unu ero da tia vetero, anstataŭ per siaj kutimaj iloj, tiam li estus krieginta tute prave. Knabeto, tremanta de malvarmo, kurbiĝis je la serurtruo de Scrooge por lin regali per kristnaska kanteto; sed ĉe la unua sono de

"Dio vin savu, sinjor',<br>Mi kore vin salutas"...

Scrooge kaptis liniilon tiel energie, ke la kantinto forflugis timege, lasante la serurtruon al la nebulo kaj al frosto.

Fine alvenis la tempo por fermi la kontoron. Malafable Scrooge deseliĝis de la tabureto kaj silente signis al la komizo en la kelo, kiu tuj elblovis la kandelon kaj surmetis sian ĉapelon.

"Vi bezonos la tutan tagon morgaŭ, mi supozas," diris Scrooge.

"Se estas al vi plaĉe, sinjoro."

"Ne estas plaĉe," diris Scrooge, "kaj ne estas juste. Se mi pro tio ĉi deprenus el via salajro du ŝilingojn, mi supozas ke vi rigardus vin mem kiel damaĝitan, ĉu ne?"

La komizo ridetis timeme.

"Kaj tamen," diris Scrooge, "min vi ne rigardos kiel damaĝita, kiam mi pagos unu tagsalajron por nelaboro."

La komizo rimarkigis, ke tio okazas nur unu fojon ĉiujare.

"Tio estas malbona senkulpigo por friponi ĉiun dudek kvinan de decembro!" diris Scrooge, butonumante sian surtuton ĝis la mentono. "Sed mi supozas, ke vi postulos la tutan tagon. Tien ĉi alvenu des pli frue la matenon sekvantan!"

La komizo promesis, ke li faros tion; kaj Scrooge eliris murmurante. Tre baldaŭ la oficejo fermiĝis kaj la komizo, kun la longaĵo de sia skarpo pendanta sub lia talio (li ne posedis

palton) kuris sur glitejon ĉe Cornhill, post serio da knaboj, dudek fojojn, ĉar estis kristnaska antaŭvespero, kaj poste li hejmenkuris al Camden Town plej eble rapide por ludi blindulan ludon.

Scrooge vespermanĝis malgaje en la kutima malgaja restoracio, kaj leginte ĉiujn ĵurnalojn, kaj sin amuzinte per sia banklibro, li iris hejmen por kuŝiĝi. Li loĝis en apartamento, kiu iam apartenis al lia mortinta kunulo. Tio estis malgaja apartamento! La korto estis tiel malluma, ke eĉ Scrooge, kiu konis ĝin tre bone, devis palpeti per siaj manoj.

Nu, fakto estas, ke nenio estis rimarkinda en la frapilo sur la pordo, krom ke ĝi estis tre granda. Estas fakto ankaŭ, ke Scrooge ĝin estis vidinta, nokte kaj matene, dum sia tuta loĝtempo tie; ankaŭ ke Scrooge ne estis imagema, tute ne. Notu ankaŭ, ke li ne estis pensinta pri Marley de tiam, kiam antaŭ sep jaroj li certiĝis posttagmeze, ke lia kunulo mortis! Kaj tiam klarigu al mi, se vi povas, kiel okazis ke Scrooge, tenante sian ŝlosilon en la pordseruro, ekvidis en la frapilo (sen intermeza ŝanĝo) — ne frapilon, sed la vizaĝon de Marley.

La vizaĝo de Marley. Ĝi ne estis en tuta mallumo kiel la aliaj objektoj en la korto, sed ĝi lumis morne, kiel putriĝanta omaro en malluma kelo. Ĝi ne estis kolerema aŭ kruelega, sed rigardis al Scrooge kiel Marley rigardis, kun fantomaj okulvitroj sur sia fantoma frunto. La haroj moviĝis strange kvazaŭ per spirado aŭ varma aero; kaj kvankam la okuloj estis tute malfermitaj, ili estis senmovaj. Tiu cirkonstanco kaj ĝia koloro palega igis ĝin terura; sed tiu terurigo ŝajnis esti sendependa de la vizaĝo kaj venis de Scrooge mem, pli ol de la esprimo de la vizaĝo de la mortinto.

Dum Scroogge rigardadis tiun ĉi fenomenon, ĝi refariĝis frapilo.

Ne estus vere, se mi dirus, ke li ne ektremis, sed li remetis sian manon sur la forlasitan ŝlosilon, ĝin rapide turnis, eniris kaj ekbruligis sian kandelon. Li paŭzis, jes, momenton sendecide, antaŭ ol li fermis la pordon; kaj li rigardis singardeme post ĝi, kvazaŭ li preskaŭ atendus vidi la harvoston de Marley elstaranta en la vestiblo. Sed nenio estis sur la pordo interne krom la ŝraŭboj kaj ŝraŭbingoj kiuj fikstenis la frapilon; tial li diris "Pa! Pu!" kaj brue fermis la pordon.

La bruo resonis tra la domo kiel tondro. Ĉiuj ĉambroj supre, kaj ĉiuj bareloj en la keloj de la vinvendisto malsupre, ŝajnis posedi apartajn eĥosonorilojn. Sed Scrooge ne estis viro timigebla de eĥoj! Li riglis la pordon, iris tra la vestiblo kaj supreniris la ŝtuparon, dum li malrapide purigis la meĉon de sia kandelo.

Mallumo estas malkara, kaj Scrooge ĝin amis.

Sed antaŭ ol li fermis la pezan pordon, li trairis siajn ĉambrojn por vidi ĉu ĉio estas en ordo. Eble la memoro pri la vizaĝo igis lin tion fari.

La saloneto, litĉambro, skatolĉambro. Ĉiuj estis en ordo. Neniu sub la tablo, neniu sub la kanapo, fajreto en la fajrujo, kulero kaj pelveto, pretaj; kaj kaseroleto da grio sur la bordo de la krado (Scrooge malvarmumis). Neniu sub la lito, neniu en la necesejo, neniu en lia tualeta robo, kiu pendis kun suspektema sinteno sur la muro.

Tute kontenta li fermis la pordon kaj sin enŝlosis; duoble enŝlosis, kio ne estis lia kutimo. Tiel gardita kontraŭ surprizoj li demetis sian kravaton, surmetis sian tualetrobon kaj pantoflojn, kaj sian noktoĉapon, kaj sidiĝis apud la fajro por manĝi sian grion.

La fajro estis tre malgranda; tute ne sufiĉa por tiel malvarmega nokto. Li devis sidi tre proksima al ĝi, antaŭ ol li povis eksenti iom da varmo. La fajrujo estis antikva, kaj ĉirkaŭpavimita per tegmentaj brikoj holandaj, kovritaj per desegnaĵoj por ilustri la Sanktajn Skribojn. Estis centoj da pentraĵoj por logi liajn pensojn; sed la vizaĝo de Marley mortinta de sep jaroj venis, kiel la bastono de la Profeto, kaj englutis ĉiujn! Estis kvazaŭ bildo de la kapo Marleya estus aperinta sur ĉiu.

"Sensencaĵo!" diris Scrooge kaj trairis la ĉambron.

Post multaj iroj kaj reiroj, li residiĝis. Renversinte sian kapon en la seĝon li okaze ekrigardis sonorilon neuzatan, kiu pendis de la muro, kaj komunikis, por ia celo nun forgesita, kun ĉambro en la plej alta etaĝo de la domo. Mirege, kaj terurege rigardadante li vidis ĉi tiun sonorilon balanciĝanta! Unue, ĝi balanciĝis tiel kviete ke ĝi preskaŭ faris neniun sonon; sed baldaŭ ĝi sonoris laŭtege kaj ĉiuj sonoriloj en la domo faris same.

Tio daŭris eble duonminuton, aŭ minuton, sed ŝajnis daŭri unu horon! La sonoriloj haltis kune, kiel ili komencis. Tiam okazis sono resona, tre malsupre, kvazaŭ oni trenus pezan ĉenon sur la bareloj en la kelo de la vinnegocisto. Scrooge tiam memoris, ke li estis aŭdinta, ke fantomoj en domoj vizitataj estis priskribataj kiel ĉentrenantoj.

La pordo de la kelo malfermiĝis kun brua sono, kaj tuj li aŭdis la sonon pli laŭtan sur la plankoj malsupre; poste la bruo suprenvenis, kaj fine aŭdiĝis apud lia pordo!

"Sensencaĵo ankoraŭ," diris Scrooge. "Mi tion ne kredos!"

Lia koloro tamen ŝanĝiĝis, kiam tuj poste fantomo venis tra la peza pordo kaj eniris la ĉambron antaŭ liaj okuloj. Kiam ĝi envenis, la mortanta flamo eksaltis, kvazaŭ por ekkrii — "Mi lin konas! La fantomo de Marley!" kaj refalis.

La sama vizaĝo; tute la sama. Marley kun sia harvosto, kutima veŝto, pantalono, kaj botoj kies drap-pendaĵoj pintiĝis kiel la harvosto, la vestobaskoj kaj la haroj sur lia kapo. La ĉeno kiun li trenis estis ligita ĉirkaŭ lia talio. Ĝi estis longa kaj ĝi ĉirkaŭis lin kiel vostego; kaj ĝi estis farita (ĉar Scrooge ĝin observis atente) — el monujoj, ŝlosiloj, pendseruroj, kalkullibroj, kontraktoj kaj pezaj ŝtalaj monujoj. Lia korpo estis travidebla, tiel ke Scrooge lin rigardante povis vidi ambaŭ butonojn sur lia vesto malantaŭe.

"Nu!" diris Scrooge, akra kaj malvarma kiel ĉiam. "Kion vi deziras de mi?"

"Multon!" (La voĉo de Marley, sendube!).

"Kiu vi estas?"

"Demandu min, kiu mi *estis*."

"Kiu vi *estis*, do?" diris Scrooge, laŭte.

"Vivante, mi estis via kunulo, Jakobo Marley."

"Ĉu vi ĉu vi ... povas ... sidiĝi?" demandis Scrooge, lin dube rigardante.

"Mi povas."

"Faru tion, do."

Scrooge faris tiun demandon, ĉar li dubis ĉu fantomo tiel travidebla povus sidiĝi; kaj li timis embarasan klarigon. Sed la fantomo sidiĝis ĉe la kontraŭa flanko de la fajrujo, kvazaŭ li tion farus kutime.

"Ĉu vi ne kredas je mi?" demandis

---

## *Kvin hispanaj miniaturoj*

Via amo estas kiel vento
la mia kiel ŝtono,
kiu estas senmova.

*

Freneza mi fariĝos,
ĉar vitejon, kiu mia estas,
iu alia rikoltas.

*

Entute ne gravas por mi,
ke la pasero en la aleo
flugas de unu arbo al alia.

*

Veron diras mi al vi:
se Sevilla estus mia,
la duonon havus vi.

*

Nun mortis mia patrino:
kaj mia nura ĉemizo
ne havas iun, kiu lavu ĝin.

*El la hispana tradukis* **Franko Luin**

la fantomo.

"Ne," respondis Scrooge.

"Kian pruvon vi deziras krom tiu de viaj sentoj?"

"Mi ne scias," diris Scrooge.

"Kial vi dubas pri viaj sentoj?"

"Ĉar io tre malgranda malhelpas ilin. Malgranda malordo stomaka ilin erarigas. Vi eble estas nedigestita peco da bovaĵo, mustardo, mola fromaĝo, aŭ fragmento da terpomo nesufiĉe kuirita!"

Scrooge ne ofte ŝercis, kaj li tiam ne sentis sin ridema. La vero estas, ke li intencis sin kuraĝigi, ĉar la voĉo fantoma tramigris lin ĝis la medolo. Estis io terura en la aero, kiu ĉirkaŭis la fantomon; Scrooge ne povis tion senti mem, sed ĝi certe ekzistis; ĉar, kvankam la fantomo sidis senmove, lia hararo, liaj baskoj kaj pendaĵoj ĉiam moviĝis kvazaŭ per vaporo varmega de forno.

"Ĉu vi vidas tiun ĉi dentpurigilon?" diris Scrooge, subite reatakante, kaj penante deturni de si almenaŭ por momenton la atenton de la fantomo senmova kiel ŝtonego.

"Jes," diris la fantomo.

"Sed vi ĝin ne rigardas," diris Scrooge.

"Tamen, mi ĝin povas vidi," respondis la fantomo.

"Nu!" diris Scrooge, "se mi ĝin englutus, dum mia tuta vivo min persekutus legiono da koboldoj, kreitaj de mi mem! Sensencaĵo, mi al vi diras, sensencaĵo!"

Tiam la fantomo ekkriis terure, kaj skuis sian ĉenon kun bruo tiel funebra kaj terura, ke Scrooge firme tenis sian seĝon, por ke li ne svenu. Sed li eĉ ankoraŭ pli timiĝis, kiam la fantomo deprenis la bandaĝon kiu ĉirkaŭis lian kapon, kvazaŭ ĝi estus tro varma kiel hejma survesto, kaj lia suba makzelosto falis sur lian bruston.

Scrooge genufleksis, plektante siajn manojn antaŭ sia vizaĝo.

"Kompaton!" li ekkriis. "Terura aperaĵo! kial vi min turmentas?"

"Animo monda, tera!" respondis la fantomo, "Ĉu vi kredas je mi aŭ ne?"

"Mi kredas ... mi devas. Sed kial fantomoj vagas sur la tero, kaj kial ili venas al mi?"

"Dio postulas ke la animoj de ĉiuj iru inter kunvivuloj, kaj ĉien vojaĝu, kaj se animo ne foriras dum vivo, ĝi kondamniĝos tion fari postmorte."

La fantomo denove kriegis kaj skuegis sian ĉenon kaj tordis siajn duonlumajn manojn.

"Vi estas ĉenita," diris Scrooge, tremante. " Diru al mi kial?"

"Mi portas la ĉenon, kiun mi forĝis dum mia vivo," respondis la fantomo. "Mi ĝin faris, ĉeneron post ĉenero, kaj metron post metro; mi ĝin surzonis propravole, kaj propravole mi ĝin portis. Ĉu la modelo ŝajnas al vi stranga?"

Scrooge tremis pli kaj pli.

"Aŭ ĉu vi volus ekscii pri la pezo kaj la longo de la ĉeno kiun vi portas mem? Ĝi estis tute same peza kaj same longa kiel tiu ĉi antaŭ sep kristnask-antaŭfestoj. Vi laboris je ĝi de tiu tempo. Ĝi estas vere tre peza ĉeno!"

Scrooge rigardis ĉirkaŭ sin sur la plankon, pensante vidi sin mem ĉirkaŭita de kvindek aŭ sesdek metroj da fera ŝnurego, sed li nenion povis vidi.

"Jakobo," li diris, petegante. "Maljuna Jakobo Marley! diru al mi pli! Konsolu min, Jakobo!"

"Mi havas nenion por doni," respondis la fantomo. "Ĉar konsolo de alia loko venas, kaj alvenas per aliaj sendatoj al aliaj viroj. Mi ankaŭ ne povos diri al vi ĉion, kion mi volas. Mi nenie povas ripozi, mi nenie povas resti, mi nenie povas halti. Mia fantomo, dum mia vivo, neniam foriris preter nia kontoro, kaj tial mi devos pene vojaĝadi."

"Vi ja vojaĝis tre malrapide, Jakobo," diris Scrooge, komerciste, kvankam humile kaj respektege.

"Malrapide!"ripetis la fantomo.

Scrooge murmuretis: "Mortinta de sep jaroj kaj ĉiam vojaĝanta?"

"Dum tiu tuta tempo," diris la fantomo. "Neniu ripozo, neniu paco. Turmentanta memriproĉo senĉesa!"

"Ĉu vi vojaĝas rapide?" diris Scrooge.

"Sur la flugiloj de la ventoj," respondis la fantomo.

"Vi povus trairi multege da landoj dum sep jaroj," diris Scrooge.

La fantomo, aŭdinte ĉi tion, rekriegis, kaj sonigis sian ĉenon terure en la senviva nokta silento ...

"Ho! malliberulo, ĉenita kaj ligita, ĉar vi ne scias, ke iom da kristana fantomo laboranta bonece en sia malgranda sfero, trovos sian vivon teran tro mallonga por esti vere utila! Ĉar vi ne scias, ke bedaŭro neniam povos elaĉeti okazojn neuzitajn en via vivo! Tamen, tia mi estis! Ho ve, tia estis mi!"

"Sed vi ĉiam estis bona komercisto, Jakobo," murmuris Scrooge, kiu nun aludis pri si mem.

"Negocoj!" kriis la fantomo, denove tordante siajn manojn —. "Homaro devus esti miaj negocoj, mia zorgo; la feliĉo komuna mia negoco; bonfarado, kompato, toleremo, jen estis miaj negocoj! La komerco estis nur kiel guto en la oceano de miaj negocoj!"

Scrooge tre malŝatis, ke la fantomo tiel parolis kaj li ektremis treege.

"Aŭskultu min!" ekkriis la fantomo. "Mia tempo estas preskaŭ for!"

"Mi aŭskultos," diris Scrooge. "Sed ne kondamnu min, kaj ne paroladu tro longe, Jakobo, mi vin petas!"

"Kial mi povas aperi ĉe vi en formo videbla, mi ne rajtas diri. Sed nevidebla mi sidis apud vi ofte kaj ofte."

Tio ne estis ideo agrabla. Scrooge tremetis, kaj viŝis la ŝviton de sia frunto.

"Tio estas grava parto de mia puno," daŭrigis la fantomo. "Mi estas ĉe vi tiun ĉi vesperon por vin averti, por ke vi eble evitu mian sorton — kaj mi mem venis por doni al vi tiun ĉi esperon, Ebenezer,"

"Ĉiam vi estis aminda al mi," diris Scrooge. "Dankon!"

"Vi estos vizitata de tri fantomoj," rimarkis tiam la fantomo.

Scrooge ekmalĝojis. "Ĉu tio estas la espero, Jakobo?"

"Jes".

"Mi — mi preferus ..."

"Se ili vin ne vizitos," diris la fantomo, "vi ne povos eviti sorton similan al mia. Atendu la unuan morgaŭ, kiam la sonorilo batos la unuan horon!"

"Ĉu mi ne povus ricevi ilin kune, kaj tiel fini la aferon?" proponetis Scrooge.

"Atendu la duan la sekvantan nokton je la sama horo, kaj la trian en la posta nokto tuj kiam la lasta bato de la dekdua horo ĉesos vibri. Ne esperu min vidi denove, kaj memoru bone ĉion, kio inter ni okazis!"

Tuj kiam li estis tiel dirinta, la fantomo prenis sian bandaĝon de la tablo kaj ĉirkaŭligis sian kapon per ĝi kiel antaŭe. Scrooge sciis tion aŭdante la krakon kiun faris la dentoj, kiam la makzelostoj estis kunligitaj per la bandaĝo. Li kuraĝis rigardeti ankoraŭ, kaj tie lia vizitanto supernatura staris apud li kaj la ĉeno estis ligita ĉirkaŭ la brako. La aperaĵo iris malantaŭen for de li kaj je ĉiu paŝo la fenestro iom malformiĝis tiel ke, kiam la fantomo alvenis tien, ĝi tute malfermiĝis. Tiam la fantomo levis sian manon, kaj tuj Scrooge aŭdis bruojn konfuzajn kaj sonojn ĝemantajn de ploro kaj malĝojo. Aŭskultinte unu momenton, la fantomo ankaŭ ĝemegis malĝoje kaj poste malaperis en la funebran nokton.

Scrooge sekvis lin al la fenestro kun ekstrema scivolo. Li rigardis eksteren.

La aero estis plena de fantomoj, tien kaj reen moviĝantaj kaj plorantaj senripoze.

Ĉiuj portis ĉenojn; neniu estis libera. Scrooge estis koninta multajn el ili dum ilia vivo. Kaj li komprenis, ke ili estis malgajegaj ĉar ili tre volis helpi la homaron, sed poreterne tia ebleco estis por ili perdita.

Fine tiuj estaĵoj kaj iliaj voĉoj foriĝis kaj la nokto reestis kiel antaŭe.

Scrooge fermis la fenestron kaj esploris la pordon, kie la fantomo estis enirinta. Ĝi estis ŝlosita duoble, kiel li mem ĝin ŝlosis, kaj la rigliloj estis netuŝitaj. Li volis diri "sensencaĵo" sed haltis ĉe la unua silabo; kaj tre bezonanta ripozon, li sin ne senvestigis, kuŝiĝis kaj tuj ekdormis.

*Tradukis:* **Martyn Westcott (1905)**
*Lingve redaktis:*
**Margaret Munrow (2000)**

# Ronjo: la fina ĉapitro

**La Espero** ***jam antaŭ pluraj jaroj publikigis la komencajn ĉapitrojn de*** **Ronjo,** ***rabista filino de Astrid Lindgren. Nun, kiam la libro fine aperis (por nun nur kiel elektronika libro elŝutebla ĉe www.esperanto.se/eLibrejo), decas aperigi plian parton. Ni elektis la finan ĉapitron.***

"Maljunaj homoj devus ne sidi kaj frostdetrui sian postaĵon ĉe sovaĝbestaj kunvenoj," Loviso diris serioze, kiam montriĝis, ke Kalva Petro la sekvantan tagon havis frostotremojn kaj dolorojn en la tuta korpo kaj rifuzis ellitiĝi. Ankaŭ post la malapero de la frostotremo li neis forlasi la kuŝejon.

"Mi povas same bone rigardi kuŝante kiel sidante," li diris.

Matiso venis ĉiutage en lian ĉambron por sciigi al li, kiel la nova rabista vivo progresas. Matiso mem estis kontenta. Borko kondutas bone, li diris, kaj li ne estas impertinenta. Elturniĝema viro li estas, kaj kune ili faris unu bonan kaptaĵon post la alia. La inspektistajn soldatojn ili trompas, tiel ke estas ĝojo vidi, kaj baldaŭ la Matisarbaro certe estos senigita de scivolemaj soldatoj, asertis Matiso.

"Jes, jes, fanfaronu, kiam vi rajdos hejmen," murmuris Kalva Petro, sed Matiso ne aŭskultis lin. Multe da tempo li ankaŭ ne havas por sidi tie.

"Via malgrasa kadukaĵo." li diris ameme kaj karesis Kalvan Petron antaŭ ol li foriris. "Provu havigi al vi iom da karno sur viaj kruroj, tiel ke vi povos stari per ili."

Kaj Loviso faris sian eblon por tio. Ŝi venis kun varma nutriga supo kaj alio, kion Petro ŝatis.

"Enigu la supon por ke vi varmiĝu," ŝi diris. Sed eĉ ne la plej varma supo povis forpeli la malvarmon el la koro de Kalva Petro kaj tio ĉagrenigis Lovison.

"Ni devas porti lin en la ŝtonhalon kaj varmigi lin," ŝi iun vesperon diris al Matiso. Kaj portata de fortaj brakoj de Matiso Kalva Petro forlasis sian solecan ĉambron. Li kuŝis kun Matiso sur lia kuŝejo. Loviso ekloĝis ĉe Ronjo, kaj ili dividis la kuŝejon.

"Finfine mi, maljuna malfeliĉulo, povas fariĝi iom degelita," diris Kalva Petro.

Matiso estis varma kiel ardanta fajro, kaj Kalva Petro proksimiĝis al li kvazaŭ infaneto, kiu serĉas varmon kaj konsolon ĉe sia patrino.

"Ne premu," Matiso diris. Sed tio ne helpis, Kalva Petro tamen rampis pli proksimen. Kaj kiam estis mateno li rifuzis reveni al sia ĉambro. En ĉi tiu kuŝejo li bonfartis kaj ĉi tie li restis. Ĉi tie li povis kuŝi kaj vidi Lovison fari sian laboron dum la tago pasis. Ĉi tie kolektiĝis la rabistoj ĉirkaŭ li kaj priskribis siajn faritaĵojn, kiam ili vespere venis hejmen. Ronjo ankaŭ venis kaj rakontis, kion ŝi kaj Birk travivis en la arbaro. Kalva Petro estis kontenta.

"Ĝuste tiel mi volas havi ĉion, dum mi atendas," li diris.

"Kion vi atendas?" demandis Matiso.

"Jes, kion vi kredas?" diris Kalva Petro.

Matiso ne povis diveni. Sed li malkviete rimarkis, ke Petro iom post iom malfortiĝas kaj li demandis Lovison:

"Kio estas kun li, vi kredas?"

"Lia aĝo," ŝi diris.

Matiso fiksrigardis ŝin malgaje.

"Sed de tio li ja ne devas morti."

"Jes, tion li faros." diris Loviso.

Tiam Matiso eksploris.

"Iru funelen," li kriis. "Tion mi ne permesos."

Loviso skuis la kapon.

"Multon vi decidas, Matiso, sed tion vi ne povas decidi."

Ronjo ankaŭ malkvietiĝis pro Kalva Petro, kaj dum li konstante pli kaj pli malfortigis, ŝi restis pli longe ĉe li. Plej ofte li kuŝis kun fermitaj okuloj, nur kelkfoje li malfermis la okulojn kaj rigardis ŝin. Tiam li ridetis kaj diris:

"Mia ĝojo kaj plezuro, vi ne forgesu tion – vi scias."

"Se mi nur povos trovi la ĝustan lokon," Ronjo diris.

"Tion vi povos," certigis Kalva Petro. "Kiam la momento venos, tiam vi trovos."

"Jes, mi faru tion," Ronjo diris.

Pasis kelka tempo kaj Kalva Petro fariĝis pli kaj pli malforta. Fine venis nokto, kiam ĉiuj maldormante gardis lin. Matiso kaj Loviso kaj Ronjo kaj la rabistoj. Kalva Petro kuŝis senmova kun la okuloj fermitaj. Matiso serĉis malkviete vivosignon. Sed estis malforta lumo ĉirkaŭ la lito malgraŭ la lumo ĉe la fajro kaj la seba kandelo, kiun Loviso ekbruligis. Ne, oni ne povis vidi vivosignon, kaj subite Matiso kriis:

"Li mortis."

Tiam Kalva Petro malfermis unu okulon kaj rigardis riproĉe al li:

"Tio mi vere ne faris. Ĉu vi kredas, ke mi ne havas bonan sencon adiaŭi antaŭ ol mi malaperas?"

Poste li denove fermis la okulojn kaj kuŝis tiel sufiĉe longe, kaj ili aŭdis nur kelkajn malfortajn pepantajn spirojn.

"Sed nun," diris Kalva Petro kaj malfermis la okulojn, "miaj bonaj amikoj, mi adiaŭas al vi ĉiuj. Ĉar nun mi mortas."

Kaj tiel li mortis. Ronjo neniam vidis iun morti kaj ŝi ploris dum momento. Sed li tamen estis tiel laca dum la lasta tempo, ŝi pensis, nun li eble ripozos en iu loko, kiun mi ne konas.

Sed Matiso iris ploregante tien kaj reen en la ŝtonhalo kaj kriis:

"Li ĉiam estis. Kaj nun li ne estas."

Ree kaj denove li kriis sammaniere:

"Li ĉiam estis. Kaj nun li ne estas."

Tiam Loviso diris: "Matiso, vi scias, ke neniu ekzistas por ĉiam. Ni naskiĝas kaj ni mortas, tiel ja ĉiam estis. Pri kio vi lamentas?"

"Sed li mankas al mi," kriis Matiso. "Li mankas al mi tiel ke trančas en la brusto."

"Ĉu vi volas, ke mi ĉirkaŭbraku vin iom?" demandis Loviso.

"Jes, faru tion tuj," kriis Matiso. "Kaj ankaŭ vi, Ronjo."

Poste li sidis klinigita alterne al Loviso kaj Ronjo kaj priploris sian ĉa-



grenon pri Kalva Petro, kiu ekzistis iam en lia vivo kaj nun ne plu estas.

La postan tagon ili enterigis Kalvan Petron ĉe la rivero. La vintro estis proksimiĝanta nun, la unua neĝo, solaj malsekaj neĝeroj, falis sur la ĉerkon de Kalva Petro, kiam Matiso kaj la rabistoj portis ĝin al la tombo. La ĉerkon Kalva Petro mem faris jam en pli junaj jaroj kaj dum ĉiuj jaroj konservis ĝin plej interne en la vestoprovizejo.

"Rabisto povas bezoni sian ĉerkon kiam li eĉ ne suspektas tion," li diris, kaj dum la lastaj jaroj li miris, ke daŭris tiel longe.

"Sed pli frue aŭ malpli frue ĝi estos bezonata," li diris.

Nun ĝi estis bezonata.

La perdo de Kalva Petro kuŝis peze super la kastelo dum la tuta vintro.

Matiso estis malgaja. La rabistoj estis ankaŭ senkuraĝaj, ĉar la humoro de Matiso decidis, ĉu funebro aŭ ĝojo regu en la Matiskastelo.



Ronjo fuĝis kun Birk en la arbaron. Tie estis nun vintro kaj kiam ŝi staris sur skioj malsupren de la montoj ŝi forgesis ĉiujn ĉagrenojn. Sed ŝi memoris ilin tuj, kiam ŝi venis hejmen kaj vidis Matison sidi kovante antaŭ la fajro.

"Konsolu min, Ronjo," li petis. "Helpu min en mia malĝojo."

"Baldaŭ estos denove printempo, tiam ĉio estos pli bona," Ronjo diris, sed tion ne opiniis Matiso.

"Kalva Petro ne vidos la printempon," li diris grumbleme kaj por tio Ronjo ne povis trovi konsolon.

Sed la vintro pasis. Kaj la printempo venis, tion ĝi ja ĉiam faras, kiu ajn vivis aŭ mortis. Matiso ĝojiĝis, tion li faris ĉiun printempon kaj li fajfis kaj kantis kiam li kiel ĉefo antaŭ siaj rabistoj elrajdis tra la Lupokaptilo. Tie atendis jam Borko kun siaj viroj. Ho, nun la rabista vivo finfine komenciĝos post longa vintro. Pro tio ili ĝojegis en sia malprudento kaj Matiso kaj Borko, ili ja naskiĝis rabistoj.

Iliaj infanoj estis multe pli saĝaj. Ili ĝojis pri tute aliaj aferoj. Ke la neĝo estas for, tiel ke ili denove povis rajdi kaj ke ili baldaŭ povos translokiĝi en la Ursogroton.

"Krome mi ĝojas, ke vi Birk neniam volas esti rabisto," Ronjo diris.

Birk ridis.

"Ne, tion mi ja ĵuris. Sed mi demandas min, per kio ni nutru nin en nia vivo, vi kaj mi."

Nun ŝi rakontis al Birk la fabelon pri la arĝentomonto de Kalva Petro, tiu, kiun la grizgnomo montris al li foje iam antaŭ longe kiel danko por sia vivo.

"Tie estas arĝentotabuloj grandaj kiel pugnoj," Ronjo diris. "Kaj kiu scias, eble ne estas fabelo? Kalva Petro ĵuris, ke estas vero. Ni povos rajdi tien iun tagon kaj esplori, mi scias kie estas."

"Sed ne urĝas," Birk diris. "Nur konservu la sekreton. Alie ĉiuj rabistoj venos kaj volos kolekti arĝenton."

Tiam Ronjo ridis.

"Vi estas same prudenta kiel Kalva Petro. Rabistoj estas rabemaj kiel buteoj, li diris. Ĝuste pro tio oni ne pripalolu la aferon al iu alia ol vi."

"Sed ni vivas bone ankaŭ sen arĝento, fratino mia," Birk diris. "En la Ursogroto aliaj aferoj estas bezonataj."

Pli kaj pli printempiĝis. Ronjo estis malkvieta antaŭ tiu momento, kiam ŝi devos rakonti al Matiso, ke ili intencas translokiĝi en la Ursogroton. Sed Matiso estis miriga viro, oni neniam povis diveni kiel li reagos.

"Mia malnova groto, jes, ĝi estas bona," li diris. "Pli bone ol tie oni ne povas loĝi en tiu ĉi sezono. Nu, kion vi diras, Loviso?"

Loviso estis alkutimiĝinta al liaj abruptaj ŝanĝoj kaj ne estis tro miriĝita.

"Iru vi, infano, se via patro opinias tiel," ŝi diris. "Sed mi certe sentos vian foreston."

"Sed vi ja revenos ĝis la aŭtuno, tion vi ja kutimas," Matiso diris, kiel se Ronjo jam dum jardeko translokiĝadis al kaj de la Ursogroto.

"Jes, mi faros kiel kutime," certigis Ronjo, ĝoja kaj surprizita, ke ĉio pasis tiel facile ĉifoje. Ŝi atendis larmojn kaj kriojn, kaj tie sidis nun Matiso kaj aspektis same feliĉa, kiel kiam li memoris siajn infanajn aventurojn en la malnova porkejo.

"Jes, kiam mi loĝis en la Ursogroto, tiam mi bone amuziĝis," li diris. "Kaj vere tiu groto estas ja mia, ne forgesu tion. Eble mi venos viziti vin iam kaj tiam."

Kiam Ronjo rakontis tion al Birk, li diris grandanime:

"Laŭ mi li volonte venu. Sed," li aldonis, "estas ripozige ne vidi lian nigran hirtokapon ĉiutage."

Frua mateno estas, belega kiel la unua mateno sur la tero. Novloĝantoj en la Ursogroto. Jen ili venas migrante tra la arbaro kaj ĉirkaŭ ili estas la tuta ravaĵo de la printempo. En ĉiuj arboj kaj ĉiuj akvoj kaj ĉiuj verdaj densejoj estas vivo, brilas kaj susuras kaj murmuras kaj kantas kaj zumas, ĉie aŭdiĝas la sovaĝa freŝa kanto de la printempo.

Kaj ili venas al sia groto, sia hejmo en la sovaĝejo. Kaj ĉio estas kiel pli frue, sekura kaj bone konata, la rivero, kiu muĝas tie malsupre, la arbaroj en la matena lumo. Ĉio estas sama kiel kutime.

"Ne timu, Birk," Ronjo diris. "Nun venos mia printempa kriego."

Kaj ŝi kriis akre kiel birdo ĝojkriegón, tiel ke aŭdiĝis fore en la arbaro.

*Tradukis:* **Runo Stridell**

# La korkontraŭondo

Mi enpakis mian someron.
Ĉio reduktiĝis
al la plej tagnecesaj
libroj, vestaĵoj, glutoj
ĉe botelo de Tuborg kun ora fezo.

Nur la kofroj dormetas ĉi ĉirkaŭ mi
kun la dormo de la lasta nokto
en mia pakita somerĉambro,
kie mia gravurita Grundtvig plusidas
en sia niĉo ĉe la altarbalustrado en Udby kirke.

Mi malrapide scias meze en la korkontraŭondo,
ke la vivo ankoraŭ ne reduktiĝis.
Mi denove elpakos
la malnovajn kofrojn de la vivo
en novaj ĉambroj.

**Anna Rystedt**

*Tradukis* **Ulla Luin**

FRANTIŠEK KOŽIK

# La naskiĝo de Pieroto

*En la medicinistan antaŭĉambron de doktoro Ricordo eniris iun novembran vesperon 1840 magra, nigre vestita viro. La kuracisto esplore rigardis la interese aspektantan vizitanton, lian altan frunton, palan vizaĝon kaj mallarĝajn lipojn.*

*"Ĉu vi malsanas, sinjoro?"*

*"Jes, doktoro. Mi opinias, ke mortdanĝere."*

*"Kiujn malfacilaĵojn vi konstatis?"*

*"Mi tristas, melankolias, la koro doloras. Min timigas la homoj, mi timas min mem. Mankas dormo."*

*"Tio ne mortdanĝeras. Mi scias pri medikamento por vi."*

*"Kiu kuracilo ĝi estas?"*

*"Medikamento, kiu vin tute sanigos. Iru viziti en la teatro la mim-aktoron, nome Deburau."*

*La pala viro kliniĝis kaj diris triste:*

*"Mi estas Deburau, sinjoro doktoro."*

*Tiel komenciĝas la biografia romano* La plej eminenta inter Pierotoj, *verkita de la ĉeĥa verkisto Frantisek Kozik, esperantisto.*

La amikeco inter Teatro Funambules kaj Teatro de Akrobatoj ne plu renoviĝis. Ambaŭ direktorejoj observis sin reciproke kun suspektemo pro postkulisaj intencoj; kun envio, kiu dumtempe ŝanĝiĝis je nova malamemo. Bertrand ĉesis dueli kaj dediĉis sin senrezerve al la propra entrepreno kaj ĝia prosperigo. Tial li inklinis aŭskulti ĉiujn bonajn konsilojn kaj sugestojn, kiuj povis fari la programon de la teatro pli atraktiva.

"Bertrand atendas. Kion vi do volas?" bonvenigis la sekvintan tagon Felikso Gasparon.

"Mi volus ŝanĝi rolojn de la soldato kaj drinkulo."

"Kion vi volus ludi? Ĉu eble princon kun gitaro?"

"Pieroton."

Poste ili estas en la direktorejo, Bertrand kun Fabien sidas en foteloj, Felikso alsidiĝis sur angulon de kesto enangule kaj Gasparo, fidante al bonaj fortoj, kiuj montriĝis en lia vivo, klarigas. Pli ol vortoj efikas liaj gestoj, lia mimiko.

"La ĉefa persono en ĉiu pantomimo estas Arlekeno," opinias Bertrand, sed aŭskultas atenteme. "Ni bezonas por li komikajn partnerojn."

"Tial mi volas prezenti Pieroton. Ankaŭ mi prikonsideris, kiel li estu vestita."

"Ni havas ja por li kostumon. Tiel lin prezentadis Blanchard, tiel Charpigni."

"Tiu tro strikte ligita jako obstaklas dancadon. Charpigni portas larĝan kolumon, sed mi ne volas ĝin; ĝi kaŝas la buŝon. Kaj la buŝo devas esti videbla."

Ili rigardas lin duonrespekte, eble kiel azeneton, kiu ŝajnigas ĉevalon, sed samtempe kun miro, de kie aperis en li tiom da certeco. "Vi imagas lin kiel Gillo'n en blua bluzo?" demandas Bertrand.

Gasparo fikse rigardis antaŭ sin, kvazaŭ li vidus sin mem en la nova kostumo, kaj diris preskaŭ kun pia akcento: "Mi volus havi liberan kitelon, bluzon kun grandaj butonoj, entute blankan. Mi volus havi larĝajn manikojn, larĝan pantalonon, ĉe ĉiu movo multajn faldetojn. Nur tiel la kostumo harmonias kun la aktoro kaj spiras kun li."

"Kaj la vizaĝo restus blanka?"

"Certe. Sed surkape ĉi tiun ĉapeton."

Gasparo surkapigis la kreaĵon fare de Justina; ĝi estas nigra kun alĝustigita kovraĵo, kiu kaŝas la hararon.

"Kaj kian ĉapelon?"

"Nenian. En pantomimo gravas ĉefe la vizaĝo, la manoj nur findiras. Observu!"

Ĉiuj devas agnoski, ke sub nigra ĉapeto blanka vizaĝo estas pli esprimiva, kaj ke peco da ŝtofo, kiu ekflirtas dum movo, vivigas personon.

"Sed ebriulo devas grimaci kaj ŝanceliĝi," ekhavis ideon Felikso. "Kaj vi aspektas malvigle."

"Jen fakto," jesas Fabien. "Li mienas kiel dum sepulto."

Afliktite li jesis, turnis sin kvazaŭ akceptante riproĉon, sed stumblis kaj ŝanceliĝis. En lia vizaĝo movis sin nek unu trajto kaj tamen ĉiuj, senvole, devis ekridi. Kaj Gasparo kun malica esprimo venke gestis: "Jen vi vidas!"

"Bone, iru!" diris Bertrand. "Provu tion! Ni ekvidos sur la scenejo!" Kaj kiam post Gasparo kaj Felikso fermiĝis la pordo, li turnis sin al Fabien: "Se mi ne eraras, kara kolego, aperos sur nia scenejo entute nova persono."

Ankaŭ Gasparo mem ne povis ĝisatendi la scenejon. Li volis scii certecon kaj eldevigus ĝin, eĉ se li devus danci sur trotuaro antaŭ kafejoj.

La prezentadoj en Funambules estis konstantaj improvizadoj de aktoroj, kiuj perfekte sciis siajn rolojn, skalojn de movoj kaj esprimoj. Tiu ĉi eta ŝanĝo povis neniun perpleksigi. Imbecilo, li volis sin rangaltigi, ili diris nur. Malgraŭ tio Felikso-Arlekeno zorgeme turnis sin, kiam anstataŭ duonebria soldato alŝoviĝis surscenejen pala Pieroto. Ili prezentis kun Kolombina la preskribitan ektimon kaj surprizon. Pieroto ekkuregis kontraŭ ilin, simile kiel faradis tion la soldato — sed lia vizaĝo dume eĉ ne moviĝis. Duonvoje li stumblis kaj falis. La homoj ekridis kaj ridis plu, kiam Pieroto leviĝis. Ankaŭ nun lia vizaĝo restis senmova, kaj tamen videblis, ke li meditas. Li gratetis sian frunton kaj mentonon. Kial fakte mi venis ĉi tien? Mi devas reveni, eble mi rememorigos tion al mi. Mi venos ripete. La publiko komprenas lin kaj scivoleme lin observas. Pieroto ekkuras kaj falas. Tuj li levas la kapon kaj atendas, ĉu en lia kapo aŭroriĝis. Nenio. Do ankoraŭ unufoje. Kaj denove! Gasparo turnas sin kaj rapide, ankoraŭ pli rapide li revenas, pli rapide falas, li volas el si elbati la perditan ideon. Poste li jam ne levas sin kaj nur frapas per si kontraŭ la teron. La publiko tondre ridas. Sed ĉia penado vanis. Pieroto kuŝas forkonsumita. Bone, li lasas tion. Li levas sin. Dum li estas dorsturnita al Arlekeno, li estas kurbigita, lia kapo senpove pendas inter liaj genuoj. Jen li ekvidis Arlekenon. Tio estas la kaŭzo! Pro tio li venis. Li volas ekkuri tien, kie li vidas la ekscesulon, la vizaĝon kaj la manojn, sed la kapo situis ankoraŭ inter la genuoj, la korpo renversiĝas kaj el tio naskiĝas nova kaskado, la komika falo kaj poste rapidega kapriolo malantaŭen. Li levas sin kaj ekkuras, sed ĝuste laŭ la kontraŭa direkto. Finfine li kuratingas, jam li havas lin.

Jes, ĉar Felikso forgesis fuĝi. Vane Kolombina tiras lin post sin. Arlekeno ŝanĝiĝis je spektanto. Sed li devis eskapi antaŭ Pieroto. Kiel reĝustigi tion?

Gasparo sentas, ke al li koncentriĝas la atentemo de la publiko, ke li regas sursceneje. Li povus prezentadi sian Pieroton, kiom longe li volus. Li ekhezitas nun, ĉu fakte li kaptis la homon, kiu lin ĝenis. En lia vizaĝo aperas esprimo: ĉu eblas, ke tiel facile mi sukcesis? Li pridubas sian feliĉon. La junulo estis kun damo. Li ĉirkaŭrigardas Arlekenon kaj serĉas ŝin. Felikso eluzas konvenan tempon por fuĝi. Gasparo lin postkuras. La situacio estas savita.

La salonego dum la sceno ne ĉesis amuzi sin. La homoj tuj eksentis al la nove vestita figuro simpation. Gasparo iras en vestejon. Li retenas spiron pro timo, kion oni diros al li. Sed io jubilas en li: Jes, jes!

La aktoroj mienas sendecide. Al tiuj, kiuj lin vidis, li plaĉis; sed la komedianta profesio ne certas kaj sukceso de unu povas signifi malprofiton por aliaj. Tial ili silentas. Sed Gasparo volas scii la veron. Ankoraŭ ne tute deŝminkita, li iras dumpaŭze al direktorejo. Ankaŭ Felikso estas tie, sen peruko, kun vizaĝo ŝminkita duonfrunte. Ankoraŭ elprofunde li spiras post la finala danco. Gasparo staras, silentas kaj rigardas vizaĝen al siaj labordonantoj. Ili decidos pri Pieroto, sed samtempe ankaŭ pri Gasparo Deburau.

"Nu?" demandas sendecide Fabien.

Aŭdeblas la spirado de Felikso, sed li silentas kaj longigas tiel la necertecon de la momento. Bertrand aŭdiĝis:

"Skribu, Fabien, al li monpunon pro atenco de la ordo sursceneje!"

La koro de Gasparo haltis.

"Kaj poste," daŭrigis Bertrand, "poste ordonu al sinjoro Lambert, kiu verkas por ni novan pantomimon, ke li alskribu tien ege gravan rolon por Pieroto! Rolos en ĝi Deburau."

Gasparo preskaŭ estis eklarmonta. Silentigu vin, frenezulo! Ankaŭ liaj manoj, sciantaj mediti kaj pensi, vagas nun ĥaose sur brusto, kaptas faldon de kitelo, la polmoj kunpremiĝas. La kaduka tolo ne eltenis tiom vervan manifestiĝon kaj disŝiriĝis.

"Mi alskribos je lia konto monpunon pro neniigo de la teatra havaĵo," morniĝas sinjoro Fabien.

"Alskribu," diras Felikso, "kaj mi pagos ĝin por li."

Kaj li foriras. Deburau postsekvas lin. Nenio plia okazis, neniu diris ion plu. Kaj tamen subite klaris, kio hodiaŭ vespere okazis. Naskiĝis inter ili la nova artisto.

Ĝoje neĝoje tion registras liaj kolegoj ĉe siaj spegulsplitoj. Ion ili murmuretas kaj vi ne scias, ĉu tio estas gratulo aŭ insulto.

Gasparo rapidas, ne scias kien, sed li rapidas ĝoje.

"Hodiaŭ vin trafis feliĉo, ĉu?" alparolas lin amike la plej juna membro de la kolektivo; li prezentadas ĝis nun rolojn de etaj knaboj.

"Ne forgesu," respondas Gasparo al li, "ke mi aĝas jam dudek kvin jarojn."

En tio eĥas tiom da amaraj rememoroj, ke kiam Gasparo foriras el la vestejo, neniu ion malican diras. Kaj dum li iras tra la koridoro eksteren, ŝajnas al li, ke iu lin observas.

Sursojle de la damvestejo staras Kolombina, fraŭlino Flora, kaj en ŝiaj grandaj okuloj brilas admiro.

Teatro Funambules surprizis siajn spektantojn per la nova teatraĵo "Pieroto somnambulo". La unuan fojon Pieroto venis en titolon de la teatraĵo.

Poste venis denove aro da arlekenaĵoj, sed Pieroto jam ne malaperis el ili. Kaj lia populareco eldevigis pluan teatraĵon, kies heroo li estis. "Pieroto, ĉefo de banditoj."

Li prezentas sin ankaŭ en "Botelo da inko"; la aŭtoro supozis eble, ke la publiko havos intereson pri sorĉisto Alkofribas aŭ feino Mimozina; sed Pieroto, kiun la magiisto ensorĉis kaj kiun la feino protektas, kaptas atenton kaj konkeras al si en la teatraĵo plian lokon.

Deburau legas la distribuon de la roloj sur teatraj afiŝoj kiel streĉan romanon. Lia nomo fine naskiĝis por teatro. Pri la teatro-provoj li vidigas ĉiam tiom da intereso, ke baldaŭ li estas por ĉiuj ĝena.

"Arlekeno kun Kolombina kaŝiĝos en pajlostako," klarigas Felikso. "Pieroto ilin rimarkas kaj li kapriolas pro ĝojo."

"Sed pli frue mi atentigos mian sinjoron, Kasandron," oponas Gasparo. "Tion ja farus ĉiu homo."

"Nia teatraĵo diferencas de la vivo. Ĝi estas plivere sonĝo."

"Bone," jesas Gasparo. "Tial neniu el la spektantoj darfas esti el ĝi vekita per io, kio fremdas al li."

"Ne tedu. Ni daŭrigas!"

Sed Gasparo ne ĉesas interrompi per siaj etaj rezervoj. Perokule ĉiam antaŭe li petas pardonon, sed poste defendas sian ideon.

"Pardonu, sinjoro Felikso, sed se Pieroto estu en tiu momento malica, li ja ne povas danci. Se li preparas insidojn, li ne povas saltadi kiel senkulpa infano."

"Ankoraŭ mi ne vidis Pieroton filozofi, Pieroto ĉiam frenezis. Ĉu fakte vi volas fari revolucion sur la scenejo?"

"Kial ne, sinjoro Felikso?" respondas Gasparo milde, sed lia vizaĝo pli palas, ol se li farunumus sin.

Felikso ne emas ridi pro tiu impertinento. "Ni daŭrigu, mil tondroj! Aŭ mi leviĝos kaj iros for!"

"Ni ekstremigis tion," konfidas direktoro Bertrand al direktoro Fabien. "Deburau tro alte sin taksas." Li iras al la scenejo kaj proponas al Felikso: "Ĉu doni al Deburau punpagon?"

"Ne," krias Felikso. "Li ja pravas!"

"Ĉu vi scias, sinjoro Felikso," aŭdacas Deburau, "senĉese pri tiu figuro mi meditis. Kaj ĉiam pli klare mi vidas ĝin!"

"Nu, ni vidu! Kaj kian konkludon vi faris?"

"Mi imagas lin analoge al homoj, kiuj iradas al ni inter la publikon. Li estas gaja kaj trista, bona kaj malbona, malica sed ankaŭ afabla, sagaca, kiel lin instruis la vivo."

"Mi petas, sed ne mienu tiel parvenue."

Tempeton ili provadas. "Deburau, kion vi faras denove?"

"Mi teatras, sinjoro Felikso."

"Vi tro amuzas vin. Vi kritikas. Kiel netolereble!"

"Mi rebonigos tion," promesas Gasparo.

"Ni agis malsaĝe," persistas je la sia la direktoro Bertrand.

"Dum ni skribis lin sur tabulo kiel numeron 9, anonime, inter la statistoj, li modestis."

Gasparo sidas en la vestejo antaŭ spegulo kaj observas la vizaĝon, kian li forportis el la scenejo. Jes, suras rideto. Kion ĝi signifas, kio estas en ĝi, Gasparo? Li esploras. En ĝi enestas la pasinteco. Sperto. Toleremo al la homaj malfortoj. Estas en li silentema obstino de humiligitoj. Sekreta intenco de la batito. Saĝo de homo, kiu jam multfoje frapis sin, vundis kaj tial lasas la aliajn vage kuradi kaj iras la plej kurtan vojon. Pasis nur kelke da semajnoj kaj ĝi estas rideto de tute alia Pieroto ol de tiu, kiu ankoraŭ nelonge bategis per sia korpo kontraŭ la teron.

Ankoraŭ neniam oni provadis en Funambules tiel ekscitite kaj en atmosfero plena de fulmoj, kiam oni studadis la novajn teatraĵojn kun Pieroto.

"Ĉu vi vidis, damoj, kion permesas al si tiu ĉi flavbekulo?" miris la primadonoj.

Se ĉirkaŭe regis granda bruo, Gasparo ĉesis la provadon.

"Mi petas vin, ĉesu! Mi ne povas labori."

"Ĉu vi aŭdis tion? Anstataŭ esti feliĉa, ke oni permesas al li ludi, li ŝovas sian nazon ĝis ŝnurejo." Finfine lia koncentrita streĉiteco altiris al la provado la ceterajn. Ĉiumatene li venadis en provojn kun novaj ideoj, per kiuj li riĉigadis sian propran kaj la tutan teatraĵon. Li ĝojis surprizi siajn gekolegojn. Enmomente, kiam la grupo malaperis, li demetis la liphararon por ripozi. Kiam la rabistoj estis revenantaj, rapide li algluis ĝin denove. Sed li ŝovis la manon en alian poŝon kaj erare fiksis al si la liphararon ruĝan. La rabistoj konsterniĝis pro la metamorfozo. Pieroto konstatis la eraron kaj volis ĝin reĝustigi. Sed nun li ekpalpis kaj lokis subnazen la liphararon blankan. La aktoroj amuzis sin kaj la sceno transiris en teatraĵon.

Ne maloftfoje okazis, ke ĉiuj lin observis kun retenita spiro. Ĉu eble, ke li estadis inter ili kaj ili neniam lin atentis? Iam li surprizis ilin per movo aŭ mieno, kian ĉi tiu scenejo ĝis nun ne vidis. Ankaŭ servistinoj en la salonego ĉesis viŝi polvon kaj gapis Gasparon.

"Ni forgesu nian ekvilibristan pasintecon," konkludis Fabien. "Fakte ni ludas teatron."

"Ankoraŭ ni ne venkis en decida batalo," avertis la skeptika Bertrand. Kaj sursceneje daŭris konfliktoj inter Gasparo kaj Felikso, kiu reĝisoris.

"Kiel vi prenas hakilon? Tiel neniam vi povus Arlekenon senkapigi."

"Nur provu tion, sinjoro Felikso, kaj vi vidos!"

Felikso devas cedi, Gasparo pravas.

"Kiel vi ellernis tion, ulaĉo?"

Gasparo ŝultrolevetas kaj ridetas. Li ne malkaŝos, ke li lasis tion montri al si de la rufa Kristoforo. Li ludas plu.

"Kiel vi rigardas?"

"Ĉu malbone?"

"Tro serioze. Mi timas, ke vere vi mortigos min."

"Vin, sinjoro Felikso?" diras Gasparo ame.

*Esperantigis:* **Jiří Karen** *kaj* **Josef Vondroušek**

EINAR ÅBERG

# Amikeco

*Ĉu la titolo* Ĉu ekzistas anĝeloj? *diras ion al vi? Unuavice vi certe pensas pri samnoma filmo kun Christina Schollin kaj Jarl Kulle. Sed ekzistas ankaŭ libro, laŭ kiu la filmo estis farita. Ĝin verkis Einar Åberg kaj ĝi aperis origine kun la titolo* Änglar finns dom, pappa?

La espero *publikigas ĉi tie ĉapitron el tiu libro. Pli frue jam aperis la komenca ĉapitro.*

Plej supre en la bankpalaco Jan malkovris fenestron, kiu estis preskaŭ turnita al la maro. Se li streĉis la kolon kaj turnis la kapon je 45 gradoj, li povis vidi la eniron en la havenon; ĝi aspektis kiel larĝa rivero, kiu larĝiĝis al vasta horizonto. La haveneniron iom ŝirmis la kamentuboj kaj mastoj, sed pli fore ĝentila mano forviŝis la malglataĵojn, kaj vico da insuloj volbiĝis kiel mamoj. Li konis ilin ĉiujn. Li vidis la ĉielon super ili kaj revis eksteren.

Sed la pozicio estis malkonforta. Pliaj du sekundoj kaj li ne povus returni la kapon sen kuracista helpo.

Li retiris ĝin, turnis ĝin en ĝustan pozicion kaj ĉirkaŭrigardis.

La banko havis multajn okulojn kaj li povis ofte trovi paron en sia proksimeco. Ela la brustopoŝo li eltiris papereton, talismanon.

Ne perdu la kuraĝon.

Li vespiris, elĵetis lastan rigardon tra la fenestro kaj plueniris.

Grandaj homoj havas momentojn da duboj kaj malforto. Kial ne malgranda viro rajtu iomete egali al ili?

Li havis ĉiukaze du amikojn en la banko: Hagson kaj Margareta. Kun du amikoj oni povas atingi kiom ajn longe. Pli multajn oni ne bezonas en la vivo.

Ili sciis, kiu li estas. Baldaŭ la tuta banko scios tion.

Rilate al la konatiĝo kun Margareta, estis tiel, ke ŝi kromlaboris la antaŭan posttagmezon. Ŝi laboris je kontraktoj, laŭ ĉies opinio la plej teda laboro en la banko. Donita al la plej bela junulino de la banko, laŭ la principo taŭga persono sur taŭga posteno.

La suno brilis kaj ŝi estis elegante vestita. Ŝi suspiradis kaj rigardadis la horloĝon fojon post fojo. Io mansvingis kaj atendis: insuloj, maro, suno, eble dancoplanko.

Unu el al kartarskatoloj, tiu per kiu ŝi laboris, estis tirita tro longe eksteren. Milimetra ŝanĝo de la pezpunkto, nur nalgranda tuŝo, kaj ĝi falos sur la plankon.

Jan aranĝis tiun tuŝon, kiam li preterpasis. La efiko estis terura en tiu malplena lokalo: sonis kiel se bombo estus ĵetita. Fraŭlino Günter saltis alten en la aeron, ridis unue histerie, poste ekploris.

—La skatolo Johansson, ŝi plorsingultis, la plej terura el ĉiuj!

—Ĉu ekzistas tiom da ili? Jan diris. Estis malfacile diri, ĉu kuŝas 400 aŭ 4000 kartoj sur la planko. Terura amaso estis. Li elturniĝis kiel unua.

—Estis mia eraro! li diris kaj komencis kolekti.

—Ne, estis mia, ŝi asertis kaj sekigis siajn okulojn. Kaj mi estis ĵus preta. Mi devus nur ...

—Mi prizorgos la kartojn, li diris. Vi iru!

Ŝi ĉesis aspekti malĝoja, rigardis lin kaj liajn vestaĵojn, diris:

—Tre koran dankon, mia nomo estas fraŭlino Günter.

—Froman, Jan diris.

—Ĉu Froman? Kiu sekcio?

—La pedela sekcio.

—Mi estos eterne dankema al vi, ŝi diris. Se mi povos helpi vin alian fojon, mi volonte faros tion.

Ekzemple, li pensis, per stenciloj, kiel kuriero aŭ per portado de tajpiloj. Sed ŝiaj vortoj estis serioze celitaj, kaj oni neniam povas scii.

Ŝi surhavis bluzon kaj jupon, arĝentan zonon ĉirkaŭ la talio kaj pezan arĝentan braceleton ĉirkaŭ la pojno. Kiam ŝi streĉis antaŭen sian dekstran manon, li vidis zipon je la dekstra flanko de la bluzo. Li fiksrigardis ĝin fascine. Li volis tiri ĝin. Estis perversa, nevenkebla dezirego, li neniam sentis ion similan.

Li englutis kaj englutis.

—Mi volonte faros tion por vi, li fine diris.

Ŝi ridetis, redankis varme kaj eterne, kunplukis siajn objektojn kaj iris. Li rigardis longe post ŝi, pensis pri ŝia bluzo kaj surgenuiĝis.

Baldaŭ poste Hanson venis survoje eksteren.

—Kion je la brulanta infero! li diris. Ĉu vi trovis mirtelojn?

—Helpu kolekti anstataŭe, Jan diris mallonge. Mi ne petis pri ĉi tio.

Hanson rigardis de la disigitaj kartoj al al kontraktopulpeto kaj reen.

—Jes ja, li diris fine, mi helpos vin. Eble estas mia vivoŝanco esti invitita al altsocieta geedziĝo.

Estis peza laboro ordigi ĉiujn Johansson de la urbo. Estis pli multaj ol atendite, kaj ili ambaŭ fariĝis malsataj.

—Sekvu min hejmen al vespermanĝo, Jan diris. Mi estas sperta je manĝofarado!

Jan loĝis plej alte sur la roko, kiu nomiĝas Granda Karlo, kaj estis nur dek, dek du minuta promeno tien. Hagson loĝis fore ĉe la urbolimo.

—Devas esti agrable eviti kunpuŝiĝi sur aŭtobusoj kaj tramoj, li rimarkigis. Mi ne havas tiajn avantaĝojn! Ĉiamaj kvereloj! Li estis spertega en aranĝado de sidloko al si per pugnoj kaj kubutoj kaj povis prave plendi, ke ĉiam estis kvereloj, kiam li veturis al kaj de la laborejo.

—Aŭtobusoj kaj tramoj estas malbeno de la civilizo, li aldonis, li opiniis, ke li devas diri ion.

Li eble devus esti atendinta iom.

Veni al la bastiono Granda Karlo estis kiel grimpi sur monton. Hagson baldaŭ perdis la spiron. Ne estus maltaŭge kun aŭtobuso, sed ĉar nek aŭtobusoj nek tramoj estas konstruitaj por montogrimpado, li devis kontentiĝi per sia propra kapablo. Sed silente li malbenis la tramkompanion.

Jan iris laŭ la kvieta trotado, kiun Hagson rekonis el la banko. Estis fakte rapida trotado, li devis duonkuri por ne postresti.

La kurbiĝantaj stratoj kuŝis silentaj kaj senhomaj. Escepte de unu aŭ alia laktejeto, kiu estis sen klientoj depost la deka matene, ne ekzistis butikoj ĉi tie. Devus havi laktejon en ĉi tiu parto, Hagson pensis por si mem.

Jan loĝis, kiel dirite, plej supre sur la roko en kvinetaĝa domo. Finfine ili estis tie. La vestiblo estis mallarĝa, malvarmeta kaj alta.

—Kioma etaĝo? Hagson demandis sensuspekte.

—Plej alte, bonŝance, Jan diris gaje. Nur kvara!

Hagson ĵetis senesperan rigardon ĉirkaŭen. Ŝtuparoj estis lia timego, estis metikomplekso.

—Ĉu ne ekzistas lifto? li demandis.

—Lifto. Ne! Neniu el la malbenoj de la civilizo ekzistas en ĉi tiu urboparto!

Ĉu estis dirite intence aŭ ne, estis forte, kaj Hagson sentis sin nokaŭtita. Necesis diri ion, ion alian. Li kaptis la tenilon, silente elspiris kaj diris malkuraĝe:

—Kiam mia Hulda iras al la manĝobutiko, ŝi kutimas forgesi la duonon. Mi miras, ĉu helpus loĝi tiamaniere.

Iom post iom ili alvenis. Tra la ŝtupara fenestro ili vidis ruĝan ladan tegmenton, kelkajn malplenajn subtegmentejajn fenestrojn — kiel se dentisto estus berserkinta sur la tegmento — dekon da fantomecaj fumtuboj kaj nenombreblan kvanton da radioan-

tenoj. Ne indis reparoli pri la civilizo, tial Hagson silentis.

—Ne speciale alloga elrigardo, Jan prezentis. Ĝi estas egala el niaj fenestroj. La bono kun ĝi estas, ke ĝi igas nin sopiri eksteren al la maro.

Sur ĉiu etaĝo Hagson nombris du loĝejojn. Same plej alte. Li rigardis la pordoŝildojn. Sur ambaŭ li legis

FROMAN

— Tie panjo loĝas, Jan klarigis, kaj ĉi tie mi.

—Ĉu vi loĝas sola? Hagson demandis surprizite, ĉar pri manko de loĝejoj oni parolis eĉ dum drinkado.

—Jes, Jan diris, kompreneble. Estas la domo de panjo. Ŝi posedas ĝin kune kun iu ŝparbanko. Eniru!

Regis kompleta silento en la loĝejo, kiu laŭ mebligo kaj aranĝo estis samaĝa kun la tempo de la praavoj. Ĝi estis malhela, la iam blanka plafono havis koloron, kiu elvokis la esprimon "fumita firsto". La ĉambroj, entute kvar, estis kaj longaj kaj larĝaj kaj altaj, kaj kun kahelaj fornoj. En la kuirejo estis lignaĵkesto kaj lignoforno kun fajrohoko kaj kupra akvujo, kiu vekis malklarajn memorojn ĉe Hagson, ion pri pumpilo, bataloj kaj kolonio. Sur la kuirforno staris bela brila primuso. La rigardo al ĝi estis konsolo al Hagson, kiu kredis, ke tiu, kiu devas prepari manĝon sur brulforno, devas ellitiĝi je la kvara matene kaj fari fajron, por ke estu varme ĝis la vespero. Kupraj kaseroloj plenigis la bretojn kaj ŝrankoj la murojn.

Jan prezentis la ĉambrojn sinsekve kiel hobioĉambro, biblioteko, dormoĉambro kaj manĝoĉambro. La prezentado ne estis nenecesa, ĉar la ĉambroj similis unu la alian kiel kvar predikoj. Libroj kuŝis ĉie, tio, kio eventuale estis lito, aspektis kiel enkonstruita ŝranko en la manĝoĉambro, la dormoĉambro estis plena da ŝraŭboj, ŝraŭbingoj, magnetoj, radiotuboj, fadenoj kaj ĉiaspecaj iloj.

—Ĉu tio estas la radio, kiun vi riparadas?

Jan aspektis ĝene tuŝita.

—Mi laboris per ĝi dum tri jaroj, li agnoskis, kaj mi promesis al mi mem, ke mi rekonstruos ĝin. Ĉiuj pecoj estas tie.

—Li diris tion, la kofromurdisto, kiam li petis pri indulgo, Hagson rimarkigis seke.

La libroj imponis al li, ĉar li mem nenion legis, sed li esprimis sian plej grandan admiron pri la gramofonarkivo. Jan havis amason da diskoj kaj belan radiogramofonon.

—Ĉu ĝi funkcias? li demandis atente.

Jan respondis jese, sed aldonis, ke li havas ankoraŭ pli belan arkivon en la kuireja halo.

Kio tio povus esti? Hagson miris. Li povis baldaŭ vidi. Ekster la kuirejo estis longa mallarĝa pasejo, kiu ŝajnis finiĝi ie, eble en la loĝejo de la patrino. Je ambaŭ flankoj de la pasejo estis ŝrankoj, kiuj streĉis sin de la planko ĝis la plafono. Sur la ŝrankoj estis pentritaj jenaj ĉefrubrikoj:

SURMETAĴOJ
VIANDAĴOJ
FIŜAĴOJ
SUPOJ
DESERTOJ

La ŝrankoj enhavis konservojn, estis tie miloj da skatoloj. Hagson estis mutigita: li neniam aŭdis pri konservarkivo.

—Ni estas tiel praktikaj, panjo kaj mi, ĉu vi ne opinias, Jan demandis kaj ŝajnis atendi laŭdon. Hagson nur kapjesis.

—Ni pagis grosistan prezon por ili, Jan aldonis, panjo havas fruktobutikon. Kion vi deziras por vespermanĝo?

Sed Hagson estis daŭre muta.

—Elektu mem! li fine elbuŝigis.

Per mansvingo Jan prenis suben tri, kvar skatolojn kaj Hagson komprenis, kion li celis, kiam li diris, ke li estas sperta je manĝofarado. Ĉar li ne kredis, ke ekzistas tiel fenomena lerteco malfermi konservkatolojn. Neniu blasfemo, neniu erara aŭ hezita manmovo, sssssss, nur aŭdiĝis, kaj tie kuŝis la kovrilo bele elsegita.

La primuso ekflamis kaj la manĝo estis preta, antaŭ ol Hagson sufiĉe rekaptis sin por ricevi la venontan ŝokon.

Se ekzistas io, kion li malŝatas, tio estas fiŝobuloj. Kial Jan servu ĝuste tion? Se estas io, kion li ne aprezas, tio estas fungoj. Kun la fiŝobuloj Jan servis fungosaŭcon, saŭcon, kiu je naŭ dekonoj konsistis el fungoj. Freŝajn terpomojn li aprezis, tio estis konsolo, sed ne tiajn, kiuj venas el konservskatolo.

Brandon kaj bieron li ankaŭ aprezis, sed tion li ne ricevis. Li devus esti supozinta tion.

Li manĝis silente kun muelanta makzelo kaj ĉirkaŭira rigardo.

—Kie en ĉi tiu loĝejo vi intencas loĝigi Margaretan Günter? li diris duonvoĉe, kiam li englutis la unuan bulon.

Jan skuis senzorge la ŝultrojn.

—Ĉi tie estas loko por ankoraŭ unu!

—Tiam estus sur la planko en la angulo dekstre de la fenestro en la hobia ĉambo, Hagson diris kaj ekatakis la duan bulon kun la sento de maratonulo, kiu post tridek kilometroj rimarkas, ke li perdiĝis.

Li estis maljusta, kiam li atakis la estontan feliĉon de Jan pro kompatinda fiŝobulo, sed ĝuste tiam li ne povis regi sin.

—Kion vi deziras kiel deserton? Jan demandis.

—Malfermu skatolon! Hagson diris malgaje.

Dirite farite, Jan revenis kun malfermita konservskatolo, du kuleroj, du teleroj kaj du glasoj, kiuj aspektis kiel vinglasoj. Terura suspekto vekiĝis en Hagson, kiu faris movon kiel se li volus fuĝi, sed refalis senvorte sur la seĝon. Okazis la plej terura. Jan venis kun botelo, kiu ne havis la kutiman botelĉapeton aŭ koloron.

Hagson rajtis je tri litroj ĉiumonate, kiujn li aŭ iu alia konscienceme eltrinkis kun aŭ sen biero. Vinon li neniam trinkis; tio estis io, kion eventuale oni povas gustumi dum entombigoj, kiam maltaŭgis engluti tion, kio celis igi la homon gaja kaj forgesigi malĝojon kaj ĉagrenojn. Li neniam povis imagi, ke estos vino kun la manĝo.

Sed je la nomo de dio. Se li jam manĝis du fiŝobulojn...

—Haltu, li kriis, ne pli! sed estis tro malfrue, la glaso jam estis plena. Li rigardis la botelon, io stranga estis skribita sur ĝi, kion li ne aŭdis pli frue, Ajö aŭ Ujo aŭ io tia. Li ekpensis pri skalpigo aŭ alia simila vorto.

La konservskatolo enhavis pirojn kaj tio aspektis pli homa. Li prenis du duonojn. Jan levis sian glason.

—Tosto por la estonteco! li diris. Kaj por Margareta Günter!

—Sanon! Hagson ekĝemis. Li levis la glason inter la montrofingro kaj dikfingro kaj rigardis kritike la nekonatan trinkaĵon. Du aferojn vi malfidu, li daŭrigis. Ĉarmajn knabinojn kaj malmultekostajn vekhorloĝojn! Tosto por Margareta Günter!

Li englutis guton, bruligis iom sur la lango. La brulsento sekvis kun la trinkaĵo suben ĝis la ventro, kie ĝi haltis je iu punkto. Li prenis pluan gluton, ĉar tamen brulis. Sed ne bruligis ĉifoje, anstataŭe estis plaĉa, jes, agrabla varmo, kiu fluis en la korpon. Li enverŝis la tutan enhavon de la glaso. Neniam antaŭe sentita sento pri feliĉo kaptis lin. En rapida sinsekvo li eltrinkis ankoraŭ kelkajn glasojn de la sendanĝera trinkaĵo.

Pri kio poste okazis, li ne multon memoris.

La feliĉosento, kiu sekvis la vinon, fluis en la langon, kiu komencis fari cirkosaltojn kaj saltomortalojn en neniam malkreskanta fluo. Ne eblis haltigi la movojn de la lango. Kaj kial li faru tion? La eta organo vivis sian propran ebriigan ĝojovivon. Ĝi parolis — ne Hagson — parolis, parolis. Pri la banko, pri Marcus, pri Stenman, pri Westin. Pri tio, kiel oni traktas la eksterlandajn klientojn, kiel okazas, kiam iu Hagson promocias kontoristojn. ("Vi vidos, kiam ajn Huss fariĝos estro de kontoro dek ses, ĉu vi kredos min tiam?") Ĝi rakontis al Jan pri la vivo, ĝi promesis al li direktoran postenon, kion ajn li volis, eĉ Margaretan Günter. Nenio estis malebla.

Kaj tio tamen estis nur tio, kion Hagson malklare memoris. Li certe diris multon pli, sed pri tio la kurteno

restis senkompate subentirita. Neniam li estis tiel feliĉa, tiel blarig, tiel babilema.

Kiel li venis hejmen restis por ĉiam nekonate al li. Li havis malklaran memoron, ke Jan donis saketon en lian manon kaj ke rozkolora nubo alglitis de super la tegmentoj kaj haltis ekster la fenestro de Jan, Hagson suriris ĝin kaj estis portita hejmen. Kiel en fabelo! Kiam li vekiĝis en sia lito la postan matenon, vestita en piĵama jako kaj bankalsono, li tenis daŭre firme la saketon en sia mano.

Lia rigardo falis unue sur ĝin. Li longe fiksrigardis ĝin, elspiris suspiron de bonfarto kaj klopodis memori, kion ĝi enhavas. Ion valoran, ion belan, ion multekostan.


Jan estis infaneca honestulo, kiu bezonas kontrolon en la vivo. Li ricevos tion!

Hagson malfermis atenteme la saketon.

Ĝi enhavis nekredeblan kvanton da rompitaj diskoj kaj malplenan vinbotelon.

Li ridis feliĉe. Jes, estis ĝuinda vespero.

*Tradukis:*
**Franko Luin**




JEROME K. JEROME

# Tri malsanuloj

***Jen klasikulo de la humura literaturo:* Tri viroj en boato*, en parte nova traduko. Ĉi tio estas la enkonduka ĉapitro.***

Ni estis kvar — Georgo kaj Vilhelmo Samuelo Harris kaj mi mem, kaj Montmorency. Ni sidis en mia loĝejo, fumis kaj parolis pri nia malbona stato, malbona el medicina vidpunkto, kompreneble.

Ni ĉiuj sentis nin malsanetaj, kio tute timigis nin. Harris diris, ke fojon post fojo li sentas tiel nekutimajn atakojn de kapturniĝo, ke li apenaŭ scias, kion li faras; tiam Georgo diris, ke ankaŭ *li* havas atakojn de kapturniĝo, kaj apenaŭ scias, kion *li* faras. Rilate min estis la hepato, kiu malbonstatis. Mi sciis, ke estas la hepato, kiu malbonstatas, ĉar mi ĵus legis cirkuleron pri patenta hepatpilolo, en kiu estis detaligitaj la diversaj simptomoj, per kiuj la homo povas konstati, kiam la hepato malbonstatas. Ĉiujn mi havis.

Estas rimarkinde ke ĉiam, kiam mi legas reklamon pri patenta kuracilo, mi ne povas eviti la konkludon, ke mi suferas tiun malsanon en ĝia plej akuta formo. La diagnozo ŝajnas ĉiufoje akordi ekzakte kun ĉiuj sentoj, kiujn mi tiam havas.

Mi memoras, ke iun tagon mi iris al la Brita muzeo por pristudi kuracadon de malgrava malsaneto, kiu min iomete posedis — mi kredas, ke estis fojnofebro. Mi prenis la libron kaj legis tion, kion mi intencis legi; poste, en momento de nesingardo, mi senpripense turnis la foliojn, kaj komencis sensisteme studi la malsanojn, ĝenerale. Mi ne plu memoras, en kiun malsanon mi unue profundiĝis — ia terura, pereiga skurĝo, mi kredas — kaj, antaŭ ol mi rigardis eĉ la unuan duonon de la listo de "avertaj simptomoj", trude eniris mian menson la konscio, ke ĝin mi jam havas.

Dum iom da tempo mi sidis glaciiĝinta pro teruro; poste, preskaŭ inerta pro malespero, mi komencis foliumi la libron. Mi trafis tifon — legis la simptomojn — konstatis, ke mi havas tifon, havis ĝin sendube jam de monatoj sen scii tion — scivolis, kion alian mi havas; min turnis al epilepsio — trovis, kiel mi atendis, ke ankaŭ ĝin mi havas — interesiĝis pri mia kazo, decidis ĝin esplori ĝisfunde kaj reiris al la komenco de la alfabeto, — legis pri astmo, kaj sciis, ke mi jam suferas la unuajn atakojn de la malsano, kaj ke la akuta stadio komenciĝos post ĉirkaŭ du semajnoj. Kun pli trankvila koro, mi trovis, ke mi havas albuminurion nur en modifita formo kaj ke, rilate al tio, ankoraŭ jarojn mi povos vivi. Ĥoleron mi havas, kun akutaj komplikaĵoj; ŝajnis, ke kun difterio mi naskiĝis. Ĉion skribitan sub la dudek ses literoj de nia alfabeto mi pene kaj konscience tralegis, kaj la sola malsano, pri kiu mi povis konkludi, ke mi ĝin ne havas, estis tropika febro.

Unue tio ĉagrenis min; ĝi ŝajnis iel malrespekta. Kial mi ne havas tropikan febron? Kial ĉi tiu ofende distinga limigo? Post iom da tempo tamen venkis malpli avaraj sentoj. Mi pripensis, ke mi havas ĉiun alian malsanon en la farmakologio, mi fariĝis malpli egoista kaj decidis malhavi tropikan febron. Podagro, en la plej maligna stadio, ŝajne sen mia scio, min jam kaptis; zimozo evidente min turmentas de mia junaĝo. Post zimozo ne estis pliaj malsanoj, tial mi konkludis, ke mi posedas nenion pli.

Mi sidis kaj meditis. Kia interesa kazo mi estas, mi pensis, el medicina vidpunkto, kia valora akiraĵo mi estus por la studentoj! Ne necesus al la studentoj trairi la malsanulejojn, se ili havus min. Ili bezonus nur iri ĉirkaŭ mi kaj post tio ili povus akiri la diplomon.

Poste mi scivolis pri tio, kiom longe mi povos vivi. Mi provis esplori min mem. Mi palpis la pulson. Unue nenian pulson mi povis palpi. Poste, tute subite, ĝi ŝajnis ekiri. Mi eltiris mian poŝhorloĝon kaj kontrolis la pulsobatadon. Mi kalkulis, ke ĝi batas cent kvardek sep fojojn ĉiuminute. Mi provis palpi la koron. Mi ne povis palpi la koron. Ĝi ĉesis bati. Mi estis certa, ke ĝi ekzistis en mi la tutan tempon, kaj ke ĝi devas ankaŭ bati, tamen mi ne povis klarigi la aferon. Mi frapetis mian tutan antaŭaĵon, de tio, kion mi nomas mia talio, ĝis la kapo kaj eĉ iomete ĉirkaŭ ambaŭ flankoj kaj iom supren sur mia dorso. Sed nenion mi povis palpi nek aŭdi. Mi provis rigardi la langon. Mi elpuŝis ĝin, kiom ĝi estis eligebla, kaj mi fermis unu okulon kaj provis ĝin esplori per la alia. Nur la pinton mi povis vidi, kaj la sola profito, kiun mi havis de tio estis, ke mi sentis pli certe ol antaŭe, ke mi havas skarlatinon.

Mi eniris tiun legoĉambron feliĉa, sana homo. Mi elrampis kaduka pereanto.

Mi iris al mia kuracisto. Li estas malnova amiko, li palpas la pulson, rigardas mian langon kaj parolas pri la vetero, ĉion senpage, ĉiufoje kiam mi imagas min malsana; mi do deci-

dis bonfari al li kaj lin vizitis. "Kuracisto bezonas ekzercadon, mi diris. Li havu min. Li havos kun mi pli da ekzercado ol el siaj mil sepcent ordinaraj, trivialaj pacientoj, ĉiu kun nur unu-du malsanoj." Mi do iris rekte al li kaj li diris:

—Nu, kiel vi fartas?

Mi diris:

—Mi ne foruzos vian tempon, kara knabo, dirante, kiel mi fartas. La vivo estas mallonga, kaj vi eble forpasos antaŭ ol mi finos. Sed mi diros, kio mankas al mi. Mi ne havas tropikan febron. Kial mi ne havas tropikan febron, mi ne povas diri; sed restas la fakto, ke mi ne havas. Ĉion alian mi tamen havas.

Mi rakontis al li, kiel okazis, ke mi ĉion malkovris. Tiam li min senvestigis kaj rigardis de kapo al piedoj kaj kaptis mian manartikon, li frapis la bruston, ĝuste kiam mi tion ne atendis — fripona ago mi nomas tion — kaj tuj poste li batis min per sia kapflanko. Post tio li sidiĝis kaj skribis recepton, ĝin faldis kaj donis al mi, kaj mi metis ĝin en mian poŝon kaj eliris.

Mi ne malfermis ĝin. Mi iris kun ĝi al la plej proksima apotekisto kaj ĝin transdonis. La viro legis ĝin, poste ĝin redonis.

Li diris, ke tion li ne havas.

Mi diris:

—Ĉu vi estas apotekisto?

Li jesis.

—Mi estas apotekisto. Se mi estus samtempe kooperativa vendejo kaj pensiono, eble mi povus vin kontentigi. Tio, ke mi estas nura apotekisto, iel malhelpas min.

Mi legis la recepton. Ĝi tekstis:

"Unu funto da bifsteko, kun duonlitro da amara biero kvar fojojn ĉiutage. Unu dekmejla marŝo ĉiumatene. Unu lito je la dekunua ekzakte ĉiunokte. Kaj ne plenigu vian kapon per aferoj, kiujn vi ne komprenas."

Mi sekvis la instrukciojn kaj la feliĉa rezulto estis — por paroli pri mi mem — ke mia vivo estis savita kaj ankoraŭ daŭras.

En la nuna kazo, por reveni al la hepatpilola cirkulero, la simptomojn mi havis preter ĉia dubo kaj la ĉefa inter ili estis "ĝenerala malinklino al ĉiaspeca laboro".

Kiom mi suferis tiurilate, lango ne povas eldiri. De mia plej frua junaĝo mi estas pro ĝi martiro. Kiam mi estis knabo, eĉ ne unu tagon la malsano min forlasis. Tiam oni ne sciis, ke kulpas mia hepato. La medicina scienco estis multe malpli progresinta ol nun kaj oni nomis ĝin mallaboremo.

—Jen vi, laborevitulo, — oni kriis, — leviĝu kaj faru ion ajn por gajni vivrimedojn. Ili ne sciis, kompreneble, ke mi estas malsana.

Ne pilolojn oni donis al mi; vangofrapojn ili donis. Kvankam ŝajnas strange, tiuj vangofrapoj min resanigis — almenaŭ por iom da tempo. Mi memoras, kiel tia vangofrapo pli efikis sur mia hepato, kaj igis min rapide iri kaj tuj fari, kion oni volis, sen plia perdo de tempo, ol faras nun tuta skatolo da piloloj.

Vi scias, ke ofte okazas tiel — tiuj simplaj, malmodernaj kuraciloj estas kelkfoje pli efikaj ol ĉiuj farmaciaĵoj.

Ni sidis tie duonhoron priparolante niajn malsanojn. Mi klarigis al Georgo kaj al Vilhelmo Harris, kiel mi sentas min, kiam mi ellitiĝas en la mateno, kaj Vilhelmo Harris diris al ni, kiel *li* sentas sin, kiam *li* enlitiĝas, kaj Georgo stariĝis sur la kamena tapiŝeto kaj donis al ni lertan kaj efikan teatraĵon ilustranta, kiel *li* sin sentas dum la nokto.

Georgo *imagas*, ke li estas malsana; sed fakte lia sano estas tute bona.

En tiu momento sinjorino Poppets frapetis la pordon por ekscii, ĉu ni estas pretaj por la vespermanĝo. Ni ridetis malgaje kaj diris, ke ni supozas, ke estus bone provi gluti ion. Harris diris, ke peceto en la stomako ofte haltigas la progreson de malsano; sinjorino Poppets enportis la pleton kaj mi altabliĝis kaj petolis kun iom da bifsteko kun cepoj kaj peco de rabarba pajo.

Devas esti, ke mi tiam estis tre malforta; ĉar mi scias, ke post proksimume duonhoro mi ŝajnis fariĝi tute indiferenta al la manĝo — afero por mi nekutima — kaj mi ne deziris fromaĝon.

Plenuminte nian devon, ni replenigis la glasojn, bruligis la pipojn kaj reprenis la interparolon pri nia sanstato. Kio fakte estis kun ni, neniu el ni povis diri precize; sed la unuanima opinio estis, ke tio — kio ajn tio estis — estas kaŭzita de troa laborado.

—Ripozon ni bezonas, — diris Harris.

—Ripozon kaj tute novan ĉirkaŭaĵon, — diris Georgo. — La trostreĉo de niaj cerboj kaŭzis ĝeneralan deprimiĝon en la tuta korpo. Nova sceno, foresto de la neceso pensi, redonos la mensan ekvilibron.

Georgo havas kuzon, kiu estas kutime priskribata en la arestdeklaroj kiel medicina studento, tial li havas nature iom de la esprimmaniero de familia kuracisto.

Mi samopiniis kun Georgo, kaj proponis, ke ni trovu solecan kaj malnovmodan lokon, malproksima de la tumulta homamaso, kaj ni forsonĝu sunplenan semajnon meze de ĝiaj dormemaj vojetoj — duonforgesitan angulon, kiun la feinoj kaŝis por si, neatingeblan por la brua mondo — kurioze lokigitan neston sur la krutaĵoj de tempo, kie la ruliĝantaj ondoj de la deknaŭa jarcento sonos malproksimaj kaj malfortaj.

Harris diris, ke li opinias, ke tio estos malgajiga. Li diris, ke li konas la specon de loko, kiun mi aludis, kie ĉiuj enlitiĝas je la oka vespere, kaj la ĵurnalon *Referee* nek per mono, nek per amo oni povas havigi, kaj por aĉeti tabakon necesas marŝi dek mejlojn.

—Ne, — Harris diris , — se ripozon kaj novan scenon vi deziras, plej bone estas marvojaĝi.

Mi forte kontraŭstaris la marvojaĝon. Marvojaĝo estas bona, se oni veturas du monatojn, sed se unu semajnon, ĝi estas malbonega.

Lunde vi foriras kun la ideo, ke vi bone amuziĝos. Vi senĝene svingas adiaŭe al la amikoj sur la bordo, bruligas vian plej grandan pipon kaj promenas fiere sur la ferdeko, kvazaŭ vi estus la kunfandaĵo de kapitano Cook, Sir Francis Drake kaj Kristoforo Kolombo. Marde vi deziras, ke vi ne estus veninta, merkrede, ĵaŭde kaj vendrede vi deziras, ke vi estus mortinta. Sabate vi kapablas gluti iom da buljono, sidiĝi sur la ferdeko kaj respondi per pala, ĉarma rideto, kiam bonkoraj homoj demandas, kiel vi fartas nun. Dimanĉe vi promenas denove kaj manĝas solidan manĝon. Lunde matene, staranta ĉe la ŝiprando kun valizo kaj ombrelo en la mano, preta alteriĝi, vi komencas plenplene ĝui la marvojaĝon.

Mi memoras, kiel foje mia bofrato foriris por mallonga marvojaĝo pro la bono de sia sano. Li aĉetis tien-reen bileton de Londono al Liverpool kaj, alveninte al Liverpool, lia sola zorgo estis vendi la revenan duonon de la bileto.

Famo diras, ke oni ofertis ĝin en la urbo por ege rabatita prezo; fine aĉetis ĝin galaspekta junulo, al kiu la kuracisto ĵus konsilis, ke li iru al la marbordo kaj ekzercu sian korpon.

—Marbordo! — diris mia bofrato, ame premante la bileton en lian manon; — jen, vi havos sufiĉe por la tuta vivo; koncerne ekzercadon, vi pli ekzercos vian korpon sidante en tiu ŝipo, ol fakosaltante sur la seka tero.

Li mem — mia bofrato — revenis vagonare. Li diris, ke por li la Nord-Okcidenta Fervojo estas sufiĉe saniga.

Alia konato mia foriris por unusemajna vojaĝo laŭlonge de la marbordo kaj antaŭ la ekiro la kelnero venis al li por demandi, ĉu li pagos ĉiun manĝon aparte aŭ ĉu li antaŭpagos la tutan serion.

La kelnero rekomendis la duan sistemon, ĉar tiel estos multe pli malmultekoste por li. Li diris, ke li manĝigos lin dum la tuta semajno por kvardek kvin ŝilingoj. Li diris, ke ĉe la matenmanĝo estos fiŝo, sekvota de rostaĵo. Lunĉo okazos je la unua kaj enhavos kvar manĝopladoj. La ĉefmanĝo je la sesa — supo, fiŝo, intermanĝo, rostaĵo, kokidaĵo, salato, pudingo, fromaĝo kaj deserto. Kaj malpeza vespermanĝo je la deka.

Mia amiko inklinis al la kvardek-kvin-ŝilinga propono (li estas bonapetitulo), kaj fine akceptis ĝin.

Tuj kiam ili estis for de Sheerness, venis la lunĉo. Li ne sentis sin tiel malsata, kiel li atendis, tial li kontentiĝis

per peco de kuirita bovaĵo kaj porcio da fragoj kaj kremo. En la daŭro de la posttagmezo li multe meditis kaj foje ŝajnis al li, ke li manĝis dum semajnoj nenion alian ol bolitan bovaĵon, foje ke li vivis dum jaroj per fragoj kaj kremo.

Ankaŭ la bovaĵo kaj fragoj kaj kremo ne ŝajnis esti kontentaj – ili ŝajnis konstante kvereli inter si.

Je la sesa oni venis por diri, ke la ĉefmanĝo estas preta. La informo neniel entuziasmigis lin, sed li konsciis, ke restas ankoraŭ granda parto de la kvardek kvin ŝilingoj, kaj kaptante ŝnurojn kaj aliajn objektojn, li malsupreniris. Plaĉa odoro de cepoj kaj varma ŝinko, miksita kun fritita fiŝo kaj legomoj, lin salutis ĉe la malsupro de la ŝtupetaro; tiam la kelnero alproksimiĝis kun oleeca rideto, kaj diris:

–Kion alporti al vi, sinjoro?

–Eligu min de ĉi tie, – estis la malforta respondo.

Oni rapidigis lin supren, apogis lin ĉe la senventa flanko kaj lasis lin tie.

Dum la sekvantaj kvar tagoj li vivis simplan kaj senriproĉan vivon per sveltkapitanaj biskvitoj (mi volas diri, ke la biskvitoj estis sveltaj, ne la kapitano) kaj sodakvo; kiam alproksimiĝis sabato, li fariĝis aroganta kaj mendis malfortan teon kaj sekan rostpanon, kaj lunde li jam regalis sin per kokina buljono. Marde li forlasis la ŝipon, kaj dum ĝi plenvapore fornaĝis de la kajo, li ĝin postrigardis kun bedaŭro.

–Jen ĝi iras, – li diris, – jen ĝi iras kun kvardek ŝilingoj da nutraĵo, kiu apartenas al mi, kaj kiun mi ne ricevis.

Li diris, ke se oni estus disponinta al li ankoraŭ unu solan tagon, li kredas, ke li povus kvitigi la konton.

Mi do la marvojaĝon kontraŭstaris. Ne, kiel mi klarigis, pro mi mem. Mi neniam estis marmalsana. Sed mi timis pro Georgo. Georgo diris, ke li fartos bone, kaj ke fakte ĝi plaĉos al li, tamen li konsilus al Harris kaj mi, ke ni eĉ ne pensu pri ĝi, ĉar li estas certa, ke ni ambaŭ malsaniĝos. Harris diris, ke por li estas ĉiam granda mistero, kiel la homoj povas marmalsaniĝi – li diris, ke li kredas, ke la homoj sendube tion faras intence, pro afekto – li diris, ke ofte li volis farigi marmalsana, sed neniam sukcesis.

Tiam li rakontis al ni, kiel li transpasis la Kanalon, kiam ventegis tiel forte, ke necesis ligi la pasaĝerojn al iliaj kuŝejoj, kaj li kaj la kapitano estis la du solaj vivantoj sur la ŝipo, kiuj ne malsaniĝis. Kelkfoje estis li kaj la dua oficiro, kiuj ne estis malsanaj; sed ĝenerale estis li kaj unu alia. Se ne li kaj unu alia, tiam estis li sola.

Estas rimarkinda fakto, sed neniu estas iam marmalsana – sur la tero. Sur la maro oni renkontas multe da homoj tre marmalsanaj, plenŝipojn da ili; sed ankoraŭ neniam mi renkontis homon sur la tero, kiu iam estis marmalsana. Estas granda mistero, kie sin kaŝas la mil-miloj da naŭziĝemaj marvojaĝantoj, kiuj svarmas sur ĉiu ŝipo.

Se plej multaj homoj similus al la viro, kiun mi vidis iun tagon sur ŝipo veturanta al Yarmouth, la ŝajnan enigmon mi povus sufiĉe facile klarigi.

Mi memoras, ke estis proksime de la marponto de Southend kaj li kliniĝis tra unu el la ŝipfenestretoj en situacio tre danĝera. Mi iris al li kaj provis lin savi.

–Ho! venu iom malantaŭen, – mi diris kaj skuis lin ĉe la ŝultro. – Vi elfalos.

–Ho, ho! mi deziras, ke estu tiel, – estis la sola respondo, kiun mi povis havigi; tie mi devis lasi lin.

Post tri semajnoj mi lin renkontis en kafoĉambro de hotelo en Bath, parolanta pri siaj vojaĝoj kaj klariganta kun entuziasmo, kiel li ŝatas la maron.

–Bona marvojaĝanto! – li diris responde al enviema demando de milda junulo; – nu, mi konfesas, ke *unufoje* mi sentis min iom malsana. Okazis proksime de Cape Horn. La ŝipo rompiĝis la postan matenon.

Mi diris:

–Ĉu vi ne estis iom malsaneta iun tagon ne malproksime de la Southend-marponto, kaj deziris, ke oni ĵetu vin en la maron?

–Southend-marponto? – li respondis kun nekomprenema mieno.

–Jes; survoje al Yarmouth, tri semajnojn antaŭ la pasinta vendredo.

–Ho, ha ... jes, – li respondis, vigliĝante; – nun mi memoras. Mi havis kapdoloron tiun posttagmezon. Kulpis la peklaĵo, vi komprenas. Ĝi estis la plej hontinda peklaĵo, kiun mi iam gustumis sur respektinda ŝipo. Ĉu *vi* manĝis iom?

Koncerne min, mi eltrovis bonegan rimedon por eviti la marmalsanon, nome en tio, ke mi tenas ekvilibron. Vi stariĝas en la mezo de la ferdeko, kaj kiam la ŝipo komencas balanci sur la ondoj, vi movas la korpon tiel, ke ĝi estu ĉiam rekta. Kiam leviĝas la antaŭo de la ŝipo, vi kliniĝas antaŭen, ĝis la ferdeko preskaŭ tuŝas vian nazon; kiam leviĝas la malantaŭa parto, vi kliniĝas malantaŭen. Dum unu-du horoj ĉio iras bone; sed tutan semajnon vin ekvilibrigi vi ne povas.

Georgo diris:

–Ni iru sur riveron.

Li diris, ke ni havos freŝan aeron, ekzercadon kaj ripozon; la konstanta ŝanĝiĝo de la sceno okupos nian menson (inkluzive la iometan, kiun Harris havas); la peniga laboro donos al ni bonan apetiton kaj igos nin dormi bone.

Harris diris, ke li ne opinias, ke Georgo rajtas fari ion, kio igos lin pli dormema ol li ĉiam estas, ĉar tio povas esti danĝera. Li diris, ke li ne bone komprenas, kiel Georgo povos dormi pli ol li nun dormas, ĉar la tago havas nur dudek kvar horojn, same somere kaj vintre; li kredas, ke se li dormos pli, li povus same egale esti mortinta kaj tiel ŝpari la koston de manĝado kaj loĝado.

Harris diris tamen, ke al li la rivero tre plaĉos. Ankaŭ al mi ĝi tre plaĉis, kaj Harris kaj mi ambaŭ diris, ke la ideo de Georgo estas bona; ni diris tion en tono, kiu iel ŝajnis komprenigi, ke ni surpriziĝis, ke Georgo povas esti tiel inteligenta.

La sola, kiu ne entuziasmiĝis pri la propono, estis Montmorency. Li neniam havas inklinon al rivero, tiu Montmorency.

–Estas bone por vi, – li diras; – tio plaĉas al vi, sed ne al mi. Nenion mi povas fari. Pejzaĝo min ne allogas kaj mi ne fumas. Se mi vidos raton, vi ne haltos; se mi endormiĝos, vi komencos petoli kun la boato kaj min faligos en la akvon. Se vi demandas min, mi nomas la tutan aferon simpla malsaĝaĵo.

Tamen ni estis tri kontraŭ unu, kaj la propono estis akceptita.

*Tradukis:* **G. Badash**
*Redaktis kaj parte novtradukis:*
**Margaret Munrow**

# La duonpreta ĉielo

*La senkuraĝo interrompas sian iron.*
*L'angoro interrompas sian iron.*
*La vulturo interrompas sian flugon.*

*Elfluas la fervora lumo,*
*eĉ la fantomoj prenas gluton.*

*Kaj niaj pentraĵoj malkaŝas sin,*
*la ruĝaj bestoj de niaj glaciepokaj pentrejoj.*

*Ĉio ekrigardas ĉirkaŭen.*
*Centope ni iras en la suno.*

*Ĉiu homo duone malfermita pordo*
*kondukanta al ĉambro por ĉiuj.*

*La senfina grundo sub ni.*

*La akvo brilas inter la arboj.*

*La lago estas fenestro al la mondo.*

**Tomas Tranströmer**

*Tradukis* **Franko Luin**

BERTHA VON SUTTNER

# For la batalilojn!

**For la batalilojn!** ***de Bertha von Suttner ne estas kontraŭmilita pamfleto, sed membiografio, siatempe tre vaste tradukata kaj uzata en pacargumantado. La esperanto-traduko aperis en 1914.***

***Ĉi tiu mallonga parto ne temas pri militoj, sed unu el ĝiaj sekvoj.***

Estis la 8-an de aŭgusto matene. Ni ĉiuj sidis ĉe tablo matenmanĝante en la verando kaj legante niajn ĵus alvenintajn postaĵojn. La du fianĉinoj sin avide ĵetis sur la al ili adresitajn leterojn – mi legis la gazetojn. El Vieno la sciigo:

"La okazoj de morto pro ĥolero maltrankvilige plimultiĝas; ne nur en la militistaj hospitaloj, sed ankaŭ en la civilaj estas multe da malsaniĝoj, kiuj estas diagnozitaj kiel vera "*cholera asiatica*"; kaj ĉie oni uzas la plej energiajn antaŭgardantajn rimedojn kontraŭ la disvastiĝo de la epidemio."

Mi estis ĵus laŭte legonta tiun sciigon, kiam onklino Maria, kun letero de amikino el najbara kastelo en mano, timigite kriis: "Terure! Betti skribas al mi, ke en ŝia domo du personoj mortis pro ĥolero kaj ke ankaŭ ŝia edzo malsaniĝis."

"Ekscelenco, la lernejestro deziras paroli kun vi!"

Malantaŭ la servisto la anoncito jam alpaŝis. Li aspektis pala kaj konfuza: "Via grafa moŝto, mi sindoneme sciigas, ke mi devas fermi la lernejon. – Hieraŭ du infanoj malsaniĝis kaj hodiaŭ – mortis."

"Pro ĥolero?" ni ĉiuj kriis.

"Jes, mi opinias ... estas pli bone uzi la ĝustan nomon. La tieldirita disenterio, kiu regis inter la soldatoj tie ĉi enloĝigitaj, kaj pro kiu jam dudek pereis – ĝi estis ĥolero. En la vilaĝo regas timego, ĉar la kuracisto alveninte tien ĉi el la urbo, malkaŝe diris, ke la terura malsano nun sendube kaptis la ĉi tiean loĝantaron.

"Kio okazas?" mi demandis aŭskultante – "oni aŭdas sonoradon."

"Estas la promorta sonorileto, baronina moŝto," respondis la lernejestro. "Sendube iu alia estas mortanta ... La kuracisto rakontis, ke en la urbo la promorta sonorilo ne plu ĉesas sonori."

Ni ĉiuj rigardis unuj la aliajn – mutaj kaj palaj. Jen ĝi ree alestas – la morto – kaj ĉiu el ni vidis ĝian ostan manon etenditan al la kapo de iu amato.

"Ni forkuru!" proponis onklino Maria.

"Kien forkuri?" diris la lernejestro. "La malsano estas jam disvastiĝinta inter la tuta najbararo."

"Malproksimen – trans la landlimon –"

"Oni certe starigos kordonon, kiu ne estos transpaŝebla."

"Tio estus terura! Certe oni ne povos malhelpi la homojn forlas infektitani landon?"

"Certe – la sanaj landoj sin defendos kontraŭ la epidemio."

"Kion fari, kion fari?!" Kaj onklino Maria tordis siajn manojn.

"Atendi la dian volon," diris mia patro kun profunda ĝemo. "Vi ja kutime estas tiel kredema rilate al la destino, Maria – mi ne komprenas vian deziron forkuri. La sorto de ĉiu homo lin atingas kie ajn li estas ... Sed tamen – mi ankaŭ preferas, ke vi infanoj, forveturu – kaj vi, Otto, ne plu tuŝu ian iajn frukton."

"Mi tuj telegrafos al Bresser," diris Friedrich, "por ke li sendu al ni desinfektilojn ..."

Kio okazis poste, tion mi ne povas detale rakonti, ĉar la matenmanĝa epizodo estis la lasta, kiun mi enskribis en la ruĝajn kajerojn. Nur memore mi povas raporti la okazintaĵojn de la sekvantaj tagoj. Timo kaj maltrankvilo nin ĉiujn ekscitis. Kiu ne tremus en tempo de epidemio, vivante kun estuloj amataj? Super la kapo de ĉiu ja flugpendas la glavo de Damoklo – kaj la ŝanco, ke oni mem mortos tiel terure kaj senutile – kiun tiu penso ne terurigus? La kuraĝo maksimume montriĝas per tio, ke oni ni pensas pri ĝi.

Ĉu forkuri? Tiu ideo ankaŭ venis en mian kapon – precipe por savi mian etan Rudolfon ...

Mia patro, malgraŭ ĉiu fatalismo, insistis pri la forkuro de la aliaj: la sekvantan tagon la tuta familio forveturu. Li sola volis resti, por ne forlasi siajn domanojn kaj la loĝantaron de la vilaĝo. Friedrich plej decide klarigis, ke ankaŭ li volas resti, kaj samtempe mi decidis, ke mi neniam libervole foriros de la flanko de mia edzo.

Onklino Maria kun la du knabinoj kaj kun Otto kaj Rudolf estis tuj forveturontaj. Kien? – tion oni ne ankoraŭ decidis – unue Hungarujon, kiel eble plej malproksimen. La fianĉinoj tute ne kontraŭstaris, sed diligente helpis enpaki ... Morti – kiam en plej proksima estonteco atendas la plenumiĝo de profunda amsopiro, t. e. dekobla vivĝojo, tio estus ja morti dekoble.

Oni alportis la vojaĝkestojn en la manĝoĉambron, por ke per la kunhelpo de ĉiuj la laboro pli rapide progresu. Mi alportis sur brako pakon da vestoj de Rudolf.

"Kial via ĉambristino tion ne faras?" demandis mia patro.

"Mi ne scias kie estas Netti ... mi jam kelkfoje sonorigis kaj ŝi ne venis ... Mi do servis min mem –"

"Vi igas viajn servistinojn malobeemaj," diris mia patro kolere, kaj li al ĉeestanta servisto ordonis, ĉie serĉi la junulinon kaj ŝin tuj alkonduki. Post kelka tempo la forsendito revenis – kun konsternita mieno.

"Netti kuŝas en sia ĉambro ... ŝi estas ... ŝi havas ... ŝi estas ..."

"Ĉu vi ne povas ĝisfine paroli?" kolere diris mia patro.

"Kia ŝi estas –?"

"Jam – tute nigra."

Krio eliĝis el ĉiu buŝo. Ĝi do estis aperinta, la terura fantomo – eĉ en nia domo.

Kion fari nun? Ĉu oni povas lasi morti la malfeliĉan knabinon tute sola, sen ia helpo? Sed, la alproksimiĝanto preskaŭ certe mortus – kaj ne nur li mem – li plie kaŭzus la morton de aliaj. – Ho ve, domo en kiun epidemio eniris, estas kiel domo ĉirkaŭita de rabistoj aŭ domo flamanta – ĉie, en ĉiuj anguloj kaj ekstremaĵoj – ĉe ĉiu paŝo minace ridaĉas la morto –

"Tuj venigu la kuraciston," ordonis mia patro. "Kaj vi, infanoj, rapidigu vian forveturon" ...

"Sinjoro doktoro reveturis en la urbon antaŭ unu horo," respondis la servisto al la patra ordono.

"Ho ve! ... mi sentas min malsana," diris subite Lili, kies lipoj paliĝis, kaj kiu alkroĉiĝis al apogilo de seĝo.

Ni alkuris por ŝin subteni:

"Kion vi havas? ... Ne estu malsaĝa ... estas nur timo ..."

Sed ne estis timo, – neniu dubo: ni estis devigataj porti la malfeliĉulinon en ŝian ĉambron, kie ŝi tuj estis kaptita de fortegaj vomoj kaj de aliaj simptomoj – estis tiun tagon la dua okazo de ĥolero en la kastelo.

Estis terure, vidi kiel suferis la kompatinda fratino. Kaj neniu kuracisto apudestis! Friedrich estis la sola, kiu laŭpove funkciis kiel tio. Li ordonis la necesaĵojn: varmajn kataplasmojn, sinapismojn sur la stomako kaj ĉe la kruroj – pecetojn da glacio – ĉampanon. Nenio utilis. La kuraciloj, kiuj ordinare sufiĉas por malgravaj atakoj ne povis ŝin savi. Tamen ili havigis al la malsanulino kaj al la ĉeestantoj la konsolon, ke oni faris sian eblon. Kiam la atakoj ĉesis, komenciĝis la spasmoj – tremo kaj kuntiriĝo de la tuta korpo tiel, ke la ostoj krakis. La

malfeliĉulino provis ĝemi: ŝi ne kapablis, ne havante plu voĉon ... la haŭto fariĝis blueta kaj malvarma — la spiro haltis — —

Mia patro kuradis tien kaj reen, tordante siajn manojn. Foje mi haltigis lin :

"Tio estas la milito, patro!" mi diris. "Ĉu vi ne volas malbeni la militon?"

Li sin liberigis de mi kaj ne respondis.

Post dek horoj Lili mortis. — Netti, la ĉambristino, estis mortinta jam pli frue — sola en sia ĉambro; ni ĉiuj estis okupitaj pri Lili, kaj neniu el la servistaro kuraĝis alproksimiĝi al la "jam tute nigra" ...

Dume alvenis d-ro Bresser. La medikamentojn telegrafe menditajn li alportis mem. Mi volonte estus kisinta lian manon, kiam li neatendite aperis en nia rondo, por ofereme servi al la malnovaj amikoj. Li tuj prenis sur sin la komandon de la domanaro. La du kadavrojn li metigis en malproksiman ĉambreton, ŝlosis la ĉambrojn, en kiuj la malfeliĉulinoj mortis kaj submetis nin ĉiujn al efika desinfektado. Forta odoro de karbolo plenigis nun ĉiujn ejojn, kaj ankoraŭ hodiaŭ, kiam mi flaras tiun odoron, tiuj terurај tagoj de ĥolero reviviĝas en mia memoro.

La planita forkuro duan fojon ne efektiviĝis. La tagon post la morto de Lili la veturilo, kiu devus forkonduki onklinon Maria kun Roza kaj Otto kaj mia etulo estis jam preta, kiam la veturigisto, kaptita de la nevidebla sufokisto, devis malsupreniri de sia seĝo.

"Do mi vin veturigos", diris mia patro, kiam li pri tio aŭdis. "Rapide — ĉu ĉio estas preta? ..."

Roza antaŭenpaŝis:

"Forveturu," ŝi diris — "mi devas resti ... mi ... sekvos al Li-li — —"

Kaj ŝi diris la veron. Je tagiĝo ankaŭ ĉi tiun duan junan fianĉinon oni portis en la kadavrejon.

Pro la teruro pri ĉi tiu nova malfeliĉaĵo la forveturo de la aliaj komprenebIe ne okazis.

Meze de mia doloro, de mia furioza timego, kaptis min denove la kolerego kontraŭ la giganta malsaĝeco, kiu libervole kaŭzas tian malbonaĵon. Kiam oni estis forportinta la kadavron de Roza, mia patro falis surgenuen, la kapon kontrau la muro ...

"Patro," mi diris — "tio estas la milito."

Neniu respondo.

"Ĉu vi aŭdas, patro ? — Nun aŭ neniam malbenu la militon!"

Sed li, regajnante sian animan ekvilibron:

"Vi memorigas al mi ... tiun ĉi malfeliĉon mi devas elteni kun soldata kuraĝo ... Ne nur mi! la tuta patrolando devis ofere verŝi larmojn kaj sangon —"

"Kion do utilas al la patrolando via sufero kaj la sufero de viaj fratoj ? Kion utilas al ĝi la bataloj perditaj, kion tiuj ĉi du rompitaj knabinaj vivoj? — Patro — ho, pro amo al mi malbenu la militon! Vidu," mi lin alproksimigis al la fenestro — nigra ĉerko estis ĵus veturigata en la korton: " Vidu — tio estas por nia Lili — kaj morgaŭ iu simila por nia Roza ... kaj postmorgaŭ eble tria — kaj kial, kial?! "

"Pro tio, ke Dio tion volas, mia infano —"

"Dio — ĉiam Dio! ... Kial do ĉiu malsaĝaĵo, ĉiu sovaĝaĵo, perforto de la homoj sin kaŝas post tiu ŝirmilo: la dia volo?"

'"Ne blasfemu, Marta, ne blasfemu nun, kiam la punanta mano de Dio tiel videble —"

Servisto kure alvenis :

"Ekscelenco — la lignaĵisto rifuzas porti la ĉerkon en la ĉambron, kie kuŝas la grafidinoj — kaj neniu kuraĝas eniri —"

"Ĉu vi ankaŭ ne, malkuraĝulo?"

"Mi ne povas sola —"

"Mi do helpos vin — mi mian filinon mem ..."

Kaj li paŝis al la pordo. "Malantaŭen!" li kriis, ĉar mi volis lin sekvi. "Mi ne permesas, ke vi sekvu, — vi ne ankaŭ mortu ... kaj pensu pri via filo!"

Kion fari? Mi hezitis ... La plej turmentiga afero en tiaj situacioj estas, ke oni ne scias, kio estas la devo. Se oni al la malsanuloj kaj mortintoj faras la amservojn, al kiuj nin instigas la koro, oni dissemas la ĝermon de la malsano kaj kreas danĝeron por la aliaj ankoraŭ indulgitaj. Oni deziras sin oferi, sed scias, ke oni samtempe riskas la pereon de aliaj.

En tia necerteco estas nur unu savo: rezigni la vivon — ne nur la propran, sed ankaŭ tiun de la amatoj — supozi, ke ĉiuj pereos — kaj helpi unu la alian kiel eble plej longe en la momentoj de sufero. Konsidero, singardo — ĉio ĉi devas ĉesi: Kune! — ĉe bordo de pereanta ŝipo — ne estas savo — "Ni nin tenu ĉirkaŭprenitaj firme, firmege, kune — ĝis lasta momento — kaj adiaŭ bela mondo!"

Tia rezignacio nin ĉiujn kaptis; ni forlasis la forkurajn projektojn; ĉiu aliris la liton de ĉiu malsanulo kaj mortinto; eĉ Bresser ne plu provis malpermesi al ni tiun agadon — la sole humanan. Lia proksimeco, lia energia, senripoza agemo donis al ni la solan senton de ŝirmiteco; almenaŭ nia subakviĝanta ŝipo ne estis sen estro.

Ha, tiu ĥolera semajno en Grumitz! ... Pli ol dudek jaroj pasis de tiu tempo, sed mi ankoraŭ frostotremegas, kiam mi rememoras ĝin. Estis nur larmoj, ĝemoj, korŝirantaj mortoscenoj — karbola odoro, ostokrakado de la konvulsie tordiĝantoj, naŭzaj simptomoj, konstanta sonorado de la promorta sonorilo, entombigoj — ne, enŝoveloj — ĉar en tiuj okazoj ne fariĝas ia funebra ceremonio; — malatento pri ĉia vivordo: neniuj manĝoj — la kuiristino estis mortinta — neniu enlitiĝo por nokta dormo — de tempo al tempo peco da manĝaĵo starante englutata, kaj frumatene malprofunda dormeto. Ekstere, kvazaŭ ironio de la indiferenta naturo, estis la plej bela somera vetero, gaja kanto de merlo, multkolora florado de la floraj bedoj ...

En la vilaĝo seninterrompa mortado — la restintaj prusoj ĉiuj mortis. "Hodiaŭ mi renkontis la tombiston," rakontis Franz, la ĉambristo, revenanta kun malplena veturilo el la tombejo. "Ĉu vi denove forkondukis kelkajn mortintojn?" mi demandis. "Jes, denove ses aŭ sep ... ĉiutage duonan dekduon, kelkfoje pli multe ... Okazas ankaŭ, ke iu aŭ alia ankoraŭ iomete movetiĝas en la veturilo — sed ne gravas — mi enigas la prusojn en la tombojn."

La postan tagon la monstro mem mortis kaj alia devis preni sur sin lian oficon — tiutempe la plej malfacila el ĉiuj. La poŝto alportis nur malĝojaĵojn, de ĉie sciigojn pri la furiozaĵoj de la epidemio kaj amleterojn de princido Heinrich, kiu nenion suspektis. Al Konrad mi estis skribinta linion, por lin prepari por la terura okazintaĵo: "Lili tre malsana". Li ne povis tuj veni — la servo lin detenis. Nur la kvaran tagon la malfeliĉulo rapide alkuris. "Ĉu Lili?" li ekkriis — "ĉu estas vere?" Survoje li estis aŭdinta pri la malfeliĉo.

Ni jesis.

Li restis nenature silenta kaj senlarma. Li nur mallaŭte diris, kvazaŭ parolante al si mem: "Mi amis ŝin dum multaj jaroj". Poste laŭte: "Kie ŝi kuŝas? — Ĉu en la tombejo?; ... Mi volas viziti ŝin ... adiaŭi ... ŝi min atendas ..." "Ĉu mi iru kun vi?" iu demandis. "Ne, mi preferas iri sola."

Li iris — kaj ni ne plu revidis lin. Sur la tombo de sia fianĉino li sin mortpafis.

Tiamaniere finiĝis Kondrad Althaus, supera leŭtenanto ĉe la 4-a husara regimento, dudeksepjara.

*Tradukis:* **Armand Caumont** (1914)
*Lingve reviziita en 2001*

UPTON SINCLAIR

# La reĝaj abisenaj anseroj

*La usona verkisto Upton Sinclair estas konata pro socikritikaj romanoj.* La gnomaŭto, *el kiu ĉi tiu ĉapitro estas prenita, estas humura junulara libro, kun serioza mesaĝo. Verkita en 1936, ĝi atentigas pri la graveco de mediprizorgo.*

Ili reveturis al la ŝoseo. Kiam ili venis al nova urbo, Rodney haltis kaj aĉetis gazeton. Sur la unua paĝo estis raporto pri la aventuroj de la mateno kaj unu referaĵo pri la strangaj manĝkutimoj de la reĝaj abisenaj anseroj. Estis bildo de Rodney kun klinita kapo kaj unu de Elizabeto, kiu faris malbelan grimacon kaj unu de la guberniestro. Tie estis eĉ priskribo de la ĉasado de la gnomaŭto kun ekzaktaj sciigoj pri la rapideco, kiun Rodney atingis en la urbo – vere terure, se panjo ekscios tion. Estis priskribo de la aŭto kaj ĝia numero.

"Baldaŭ ili promesos rekompencon al tiu, kiu kaptos nin," diris Rodney.

"Kion ni faru?" demandis Elizabeto, kiu ne povis helpi, ke ŝi opiniis, ke la furioza ĉasado estis streĉa kaj ankaŭ ŝatis vidi sian bildon en la gazeto. Rodney respondis, ke ili estonte devos veturi inkognite. Li klarigis, ke vizitantaj reĝuloj, kiuj volas malhavi societajn devojn, ofte veturas sub falsa nomo. Se tio konvenas al princoj kaj reĝoj, tiam ne povas esti maltaŭga por heredonto de lignaĵa reĝo.

Rodney klarigis, ke li de nun estas Jeremiah Titherton Jenkins el Kalamazoo, Michigan. Elizabeto opiniis, ke estas stranga nomo kaj miris, kiel Rodney trovis ĝin. Rodney respondis, ke oni devas elekti strangan nomon, alie povas okazi, ke vere ekzistanta persono havas ĝuste tiun nomon, kaj tiu persono povus esti ĉekfalsigisto aŭ serĉata pro bankrabo.

Elizabeto subridis pro ekscito.

"Kiu do estas mi?" ŝi demandis. "Ĉu ankaŭ knabinoj rabas bankojn?"

Rodney diris, ke certe ekzistas rabistinoj, sed ke eble estas pli bone, ke ŝi prezentiĝu kiel lia filino aŭ eble lia guvernistino, kiel plaĉas al ŝi. Elizabeto diris, ke ŝi preferus esti Jacqueline Kennedy, sed Rodney ne kredis, ke tio estus granda helpo en iliaj provoj eviti gazetraportistojn.

Fine ili interkonsentis, ke Luzita Louice Jenkins estas bela kaj bonsona nomo, kiu ne sonas kvazaŭ ĝi apartenus al ĉekfalsigistino aŭ bankrabistino. Bobo decidis, ke ankaŭ li veturos inkognite. Inter la gigantaj mamutarboj estis unu, kiu nomiĝis Generalo Sherman, kaj Bobo do estos Generalo Sherman, ĝis kiam oni trovos ion pli bonan.

Sed estis tute maleble interesigi Glogon akcepti nomon de grandulo. Li ankaŭ ne aprobis, ke Bobo portu nomon de grandulo, eĉ ne nomon de generalo. Estis evidente, ke Glogo malvolonte vidis, ke Bobo ekhavis tioman intereson pri la privataj aferoj de la granduloj.

Estis tempo enlitiĝi, kaj ili haltis en urbo. Ili ne veturis per la gnomaŭto al hotelo, sed parkis ĝin en parkejo.

La aŭtopriservisto ŝajne ne legis la posttagmezajn gazetojn, kaj li donis la kvitancon sen komentarojn aŭ demandojn. Rodney prenis la du korbojn, Elizabeto portis la valizon, kaj ili paŝis preter la venonta angulo al hotelo. Rodney iris al la akceptejo kaj skribis "Jeremia Titherton Jenkins, Kalamazoo, Mich., kaj Lucita Louice Jenkins, same, same" en la registrolibro. Poste li mendis, kiel kutime, du ĉambrojn kun komuna banĉambro.

La pordisto rigardis al la du korboj kaj diris: "Mi petas pardonon, sinjoro, sed ni ne permesas dorlotbestojn en la ĉambroj."

"Mi ne havas dorlotbestojn," respondis Rodney. "La korboj enhavas antropologiajn provaĵojn."

"Mi komprenas," respondis la pordisto, sed ne aspektis, ke li vere estis kompreninta. Estu kiel ajn, li tamen petis la servoknabon montri al ili la ĉambrojn 317 kaj 319.

Rodney kondutis tre serioze kaj inde, kaj ne diris vorton pri fordonado de latoj. Ili ŝlosis la pordojn kaj aranĝis sin hejmece, kaj ĉifoje ne ĝenis sonantaj telefonoj, nek frapoj sur la pordo. Ĉiuj dormis bone kaj pace. Elizabeto sonĝis, ke ŝi estas Jacqueline Kennedy, kiu faras triumfe ĝojan ŝtatviziton en Addis Abeba, la ĉefurbo en Abisenio.

"Bonan matenon, sinjoro Jenkins," diris la ĝentila pordisto. "Mi esperas, ke vi dormis bone." Rodney asertis, ke tiel estis kaj pagis la kalkulon kaj repuŝis ĉiujn provojn de la servoknabo preni la korbojn kaj iri al la parkejo por havigi la aŭton. Ili iris sen akompanantoj kune en la straton. Rodney ellasis elspiron de malstreĉiĝo kaj diris: "Mi kredas, ke mi eble restos sinjoro Jenkins por la resto de mia vivo."

Ili eniris la aŭton kaj Rodney veturis al aŭtoriparejo, ĉar li estis elpensinta planon por pli bona aranĝo por liaj du protektatoj. Unue la malantaŭa sidloko en la aŭto ne estis tiel alta, ke ili povis rigardi tra la fenestro sen stari sur la pakaĵo. Due ili ofte puŝiĝis kontraŭ la plafonon, se la vojo estis kavoplena, kaj ĉe subita bremsiĝo ili estis ĵetataj de la sidloko sur la plankon. Rodney do deziris unu kroman sidkusenon por la sidloko, kaj li deziris ankaŭ kelkajn ringetojn fiksitaj en la aŭtovandoj kaj ŝnurojn, kiujn oni povas fiksi en tiuj ringoj, tiel ke la gnomoj havu apogon antaŭ la sidloko.

Rodney haltis antaŭ riparejo kaj viro alvenis. Rodney klarigis, kion li volas, sed kompreneble ne kial. La viro diris, ke li certe povos liveri taŭgan kusenon, sed eble ĝia koloro ne harmonios kun la remburaĵo en la aŭto. Rodney respondis, ke tio ne gravas, ĉar oni tamen kovros ĝin per vojaĝa plejdo.

Mekanikisto venis por ŝraŭbfiksi la ringojn, kaj Rodney prenis la korbojn kaj starigis ilin en la antaŭan sidlokon. Eble li traktis ilin tro singarde. Estu kiel ajn, la rigardo de la mekanikisto ŝanĝiĝis – liaj okuloj lumis per tiu speciala brilo, kiu igas la kompatindajn reĝulojn, kiuj veturas inkognite, senti la malagrablan veron, ke ili estas rekonataj. La mekanikisto iris por havigi iun ilon, kaj kompreneble li rakontis al la aliaj, kion li rimarkis. Baldaŭ staris tajpistino ĉe fenestro, kaj kelkaj aliaj el la dungitoj ŝajnis ne havi alian okupon ol prigapi la lignaĵheredonton kaj lian nevinon kaj la aŭton, kie la du reĝaj abisenaj anseroj sidis en siaj korboj sur la antaŭa sidloko, dum la malantaŭa sidloko altiĝis, tiel ke la anseroj povos ĝui la rigardon, kaj ŝnuro estis tirita antaŭ la sidloko, por ke ili ne falu. Ĉu oni povus imagi ion pli frenezan?

Kompreneble unu stratvaganto haltis por vidi, kio okazas, kaj poste ankoraŭ unu. La magiaj vortoj disvastiĝis fulmrapide.

"La anseroj estas ĉi tie! La reĝaj abisenaj anseroj!"

Kaj homoj venis kuregante el butikoj kaj trans la strato, kaj fariĝis homamaso, kvazaŭ estus fajroakcidento aŭ revolvera prirabo.

Rodney kaj Elizabeto estis kaptitaj. Ili ne havis elirejon kun siaj korboj. Ili devis resti, kie ili estis, kaj kontroli la muntadon de la kroma kuseno kaj la ĝustan lokigon de la ringoj – kaj provi aspekti kvazaŭ ili estus tute sensciaj, ke duondekduo da knabetoj rigardaĉas ilin tra la aŭtaj fenestroj.

Kaj fine la katastrofo estis kompleta – senhonta juna viro penetris tra la

homamaso.

"Bonan matenon, sinjoro Sinsabow, mi estas ĵurnalisto de *La Vespera Fajrero*, nia loka gazeto. Vi ne povas imagi, kiel ĝojaj ni estas, ke vi vizitas nian urbon."

"Kaj vi ne povas imagi kiel ĝoja mi estas, ke mi povos forlasi vian urbon," respondis Rodney akre.

"Vi mendis diversajn ŝanĝojn en via aŭto? Kun penso pri la komforto de la anseroj, mi komprenas."

La juna viro estis tiel ekscitita, kiel se li ĵus estus trovinta oron en Kalifornio:

"Ĉu mi rajtas demandi, kiujn ŝanĝojn oni faras? Unu kroma kuseno? Por ke la anseroj atingu pli alte, mi supozas. Ĉu ili ne havas sufiĉe longajn kolojn?"

"Jes, sed ili ne havas tiel longajn kolojn kiel certaj personoj, kiuj provas kapti ekvideton de ili."

"Sinjoro Sinsabow, mi fakte petas pardonon pro tio, ke mi trudas min. Estas io, kion ni ĵurnalistoj ne povas helpi. Ni ricevas certajn taskojn – kaj ankaŭ mi devas vivi."

"Fama viro iam diris: 'Mia sinjoro, mi ne povas kompreni, ke tio estas necesa'."

Sed la ĵurnalisto ne estis retenebla. "Vi metigas ŝnurojn antaŭ la malantaŭa sidloko? Certe po ke la anseroj ne difektiĝu. Ĉu ili estas difektitaj? Vi povus diri, ĉu ili jam estas difektitaj?"

"Ili fartis bonege, kiam mi laste vidis ilin."

"Vi havas ilin en tiuj korboj, ĉu ne? Vi povus ja permesi al mi rapidan rigardon, tiel ke mi tamen povus diri, ke mi vidis ilin?"

"Vi ĉiuokaze diros, ke vi vidis ilin. Do, kiel diferencas?"

"Mi komprenas, ke vi ne ŝatas ĵurnalistojn, sinjoro Sinsabow."

"Ekzistas anekdoto pri viro, kiu trifoje estis elĵetita el restoracio. La lastan fojon li leviĝis kaj diris: 'Mi scias, kio estas la kaŭzo. Ili ne volas, ke mi estu tie endome.' "

"Sinjoro Sinsabow, estas unu afero, kiu ne estas priparolita en pli fruaj reportaĵoj pri viaj anseroj, kaj tio estas iliaj nomoj. Ĉar kompreneble ili ja havas nomojn?"

"Jes, kompreneble."

"Ĉu mi rajtas demandi kiel ili nomiĝas?"

"La viransero nomiĝas Jeremia Titherton Jenkins kaj la anserino Lucita Louise Jenkins."

Elizabeto subridis kaj mordis la lipojn por sufoki la ridon. La ĵurnalisto havis notlibron en la mano kaj skribis ardanta pro fervoro. Li ripetis la nomojn "Jeremia Titherton Jenkins" kaj "Lucita Louise Jenkins" dum li skribis.

Poste li diris:

"Tio ja ne estas abisenaj nomoj?"

"Ho, ne," diris Rodney, "ili estas tradukitaj."

"Kaj kiel sonas iliaj originaj abisenaj nomoj?"

"Jacqueline Kennedy kaj Generalo Sherman."

"Vi mokŝercas kun mi," diris la ĵurnalisto.

"Absolute ne," asertis Rodney.

La diskuto estis subite interrompita de alia viro, kiu penetris tra la homamaso portante unu el la timigaj nigraj skatoloj.

"Disiĝu, se mi rajtas peti," li diris al la homoj. "Mi devas havi bildon."

"Karaj homoj, mi petas, absolute ne disiĝu," diris Rodney.

La fotisto denove malaperis en la homamaso, li petegis kaj kriis, kaj fine li ricevis la deziritan lokon kaj supreniĝis la fotilon.

En sia malespero Rodney kaptis dikan viron apude kaj metis lin antaŭ si. "Prenu mian lokon," li petis.

"Mi ne volas lin, mi volas vin," kriis la fotisto.

"Sed mi volas lin," Rodney klarigis decide.

La fotisto petis kaj petegis, ke la dika viro foriru, sed Rodney flustris en la orelon de la dikulo: "Mi donos al vi dudek kvin dolarojn, se vi daŭre baros la vojon al la fotisto." Kaj la dika viro restis.

Elizabeto jam iom timis pro tiu kriado kaj interpuŝado. Sed kiam ŝi vidis, ke Rodney skuiĝas pro rido, ankaŭ ŝi komencis ridi. La mekanikisto finis sian laboron kaj ŝajne ne emis daŭrigi. La kroma kuseno jam estis muntita, kaj Rodney decidis, ke nun sufiĉas.

Ankoraŭ kun la dika viro antaŭ si kvazaŭ ŝirmilo li petis la mekanikiston lasi la ringojn kaj ŝraŭbojn en la aŭto, pagis la interkonsentitan prezon kaj la dudek kvin dolarojn al la dikulo kaj petis Elizabeton enaŭtiĝi. Li levis la korbon de la sidloko, donis ĝin al Elizabeto kaj signalis por disigi la homojn.

La gnomaŭto ekmoviĝis kaj malrapide rulis laŭ la strato kun vosto da duondekduo da aŭtoj post si. Daŭris sufiĉe da tempo antaŭ ol ili liberiĝis de la persekutantoj kaj trovis kvietan lokon, kie ili povis ellasi la gnomojn.

"Kio estas? Kio okazis?" Bobo eligis amason da demandoj.

Estis ja terure sidi enŝlosita en mallumo tiel longe. Elizabeto rakontis pri la dika sinjoro kaj la kolera fotisto. Bobo iom post iom komprenis, ke liaj amikoj okupas notindan staton en la societo, kaj li estis same interesita pri tio, kiel kiu ajn leganto de skandalaj kronikoj en la gazetoj. Finfine, ĉion konsiderante, eble Bobo volonte estus veninta el sia korbo por esti fotita kun siaj amikoj kaj poste havi tiun bildon publikigita en ĉiuj gazetoj de la mondo.

Kun Glogo estis tute alia afero. La miljara gnomo aŭskultis kun malaproba silento. Okazaĵo tia, kiun li ĵus ĉeestis, firmigis lian komprenon, ke la homa mondo estas freneza. Je tiu tempo li eltrovis, ke la granduloj havas grandan potencon kaj ke ili povas decidi pri la sorto de gnomoj. Kiel kuraco kontraŭ neŭrastenio la gnomaŭta ekskurso ne ŝajnis efiki.

Ekzakte tion Rodney supozis.

"Mi komencas kredi, ke ni devas ĉesigi la historion kun la abisenaj anseroj," li diris. "Ni devos forlasi niajn anserojn."

"Sed kiel?" demandis Elizabeto.

"Ni povas, ekzemple, buĉi ilin kaj formanĝi ilin."

"Oh, Rodney!"

"Aŭ ni povas fordoni ilin aŭ vendi ilin kaj doni la monon al iu bonfara celo."

"Sed ni ja ne havas anserojn, Rodney!"

"Ni devos havigi al ni paron. Oni ne lasos nin en paco, antaŭ ol ni faris tion."

"Ni veturu al Abisenio," ĉirpis Bobo.

Sed Rodney diris, ke li ne kredas, ke tio estas ebla. Kontraŭe, ili devos aĉeti paron da abisenaj anseroj en Kalifornio. Ili devos prokrasti la serĉadon de gnomoj kaj anstataŭe komenci ĉasadon de domanseroj. Tion Glogo certe aprobus – li certe ŝatus anserojn pli ol homojn.

Rodney haltis en la plej proksima urbo, eniris fervendejon kaj aĉetis du korbojn kun kovriloj, pli grandajn ol tiuj, kiujn ili ĝis nun uzis. En la bazaro li aĉetis skatolon kun akvarelaj farboj kaj pecon da bruna ŝtofo kaj kudrilojn kaj fadenon.

"Nun ni estas pretaj por anserĉasado," li diris. Li petis al Elizabeto, ke ŝi kudru du etajn ĉapojn, proksimume same grandaj kiel tiuj de Bobo kaj Glogo, kaj kun mentonrimenoj, por ke ili sidu fikse sur la anseraj kapoj.

Ne estus tre facile trovi anserojn en San Joaquinvalo, ĉar tie troviĝas nek lagoj nek riveretoj, kaj akvon oni pumpis el subteraj putoj. Rodney elektis vojon, kiu gvidis tra pasejo kaj poste al la marbordo. Estis bela vojo kaj baldaŭ ili estis en arbaroj, en kiuj oni laŭ la aspekto preskaŭ povus trovi gnomojn. Poste ili venis en valon, kaj en la valo estis kamparanaj domoj, kaj malantaŭ unu domo vidiĝis bazeno, kaj en la bazeno naĝis – hip hurao! – neĝe blankaj anseroj.

Rodney parkis la gnomaŭton iom for de la domo por ne riski esti rekonata. Portante la novajn korbojn li eniris kaj parolis kun kamparano kaj ekscis, ke li povas aĉeti paron da junaj viglaj anseroj por kvar dolaroj. Li pagis la postulitan prezon kaj la kamparano havigis iom da greno kaj vokis la birdojn al festa manĝaĵo.

Li elektis viranseron kaj Rodney elektis anserinon. Ili ĵetis sin super ilin – kaj ekestis batalo, por kiu Bobo kaj Elizabeto estus multon pagintaj, se ili povus ĝin rigardi. Oni malfacile imagas al si la forton, kiu kaŝas sin en juna kalifornia ansero kaj kiaj klopodoj estas necesaj por enigi ĝin en korbon kaj surmeti la kovrilon. Antaŭ ol

la batalo estis finita Rodney estis ruĝa en la vizaĝo, lia bone tajlorita kostumo bezonis brospurigon, kaj li havis vundeton sur unu mano.

Li portis siajn viktimojn al la gnomaŭto, kaj vi povas imagi, ke ĝi nun estis plena de korboj kaj valizoj kaj anseroj kaj gnomoj kaj knabino. Kiam ili atingis kvietan kaj kaŝitan lokon, kie ili povis manĝi lunĉon, Rodney metis la korbojn kun la anseroj sur la teron kaj petis Elizabeton prepari la akvofarbojn kaj malsekigi la oranĝruĝan farbokuketon kaj la rozkoloran. Ĉiuj infanoj scias, ke oni ne povas solvi novan farbokukon en unu momento. Elizabeto laboris, kaj Bobo faris multajn demandojn pri farbo — el kiuj floroj ĝi venas kaj ĉu ĝi estas manĝebla. Fine Elizabeto informis, ke ŝi estas preta, kaj Rodney eksidis sur unu el la korboj kaj levis la kovrilon nur tiom, ke la ansero povis trameti kapon kaj kolon.

Juna vigla ansero tenas sin kvieta kiom ajn longe en mallumo, sed kiam ĝi ekvidas etan esperon pri libereco, tiam ĝi ŝanĝas konduton. Rodney devis teni ĝin tre forte ĉirkaŭ la kolo, dum li per la alia mano tenis la bekon.

"Ansereto," Elizabeto diris, "ĉu vi komprenas, ke ĉi tio estas kosmetika salono? Parolu kun ŝi, Bobo, kaj klarigu."

Sed Bobo malfeliĉe ne sciis, kio estas kosmetika salono, kaj pro tio li ne povis traduki al ansera lingvo. Li komprenis kelkajn vortojn de ilia lingvo, sed ĉi tiuj malantaŭkortaj birdoj estis tute fremdaj al li.

Elizabeto prenis la penikon, kaj kun amema zorgo de naskita artisto ŝi pentris belaspektajn rozruĝajn makulojn sur la vangoj de la anseroj.

"Tiel ja faras ĉiuj damoj," diris Rodney. "Do, kial la anseroj ne faru same?"

Elizabeto daŭrigis pentri ornamigajn orflavajn ringojn sur iliajn vertojn, tiel grandajn, ke ili estis videblaj ankaŭ se ili surhavis la ĉapojn. Ŝi provis la ĉapojn sur ili, kaj ili sidis perfekte. Ŝi volis lasi ilin tie, sed Rodney diris, ke la anseroj eble povus frotfaligi ilin en la korboj kaj formanĝi ilin aŭ sidiĝi sur ilin. La ĉapoj estis por solenaj okazoj.

La kapoj kaj koloj de la anseroj estis do repremitaj en la korbojn kaj Rodney diris:

"Estus amuze havi etan poemon pri niaj anseroj, aŭ kion vi opinias?"

"Ho, jes," samopiniis Elizabeto kaj Bobo. Ili sidis plenaj de respekto kaj rigardis dum Rodney pensadis kelkajn minutojn. Fine li kraĉotusis kaj legis:

*Jen anser' de fremda aro*
*Sensaci' por gazetaro*
*Kun oraj kronoj elkovitaj*
*Lumantaj klare, ne fuŝitaj*
*La vangoj ruĝe bele ardas*
*Sen ŝminko tamen logas,*
*Kiam ni per vosto signas,*
*La gazetistoj tuj ariĝas.*

Poste ili lunĉis. Rodney prenis krajonon kaj notlibron kaj skribis kelkajn telegramojn, kiujn li laŭtlegis por la gnomoj, la anseroj kaj la knabino.

"La Direktoro de Imperia Hotelo, San Francisko: Rezervu ĉambraron por gazetara konferenco kun reĝaj abisenaj anseroj je la kvina vespere. Rodney Sinsabow."

Tio estis la unua. La dua estis adresita al ĉiuj gazetoj kaj novaĵagentejoj en la granda urbo.

"La reĝaj abisenaj anseroj, konataj sub la nomojn Jacqueline Kennedy kaj Generalo Sherman, invitas vin al akcepto en sia ĉambraro en Imperia Hotelo hodiaŭ je la kvina posttagmeze."

Li sendis ankaŭ telegramon al la sekretario de Verda Kruco, organizo, deklaris Rodney, kiu laboras por protekti la arbarojn. Tion Glogo aprobos, li aldonis, kaj la maljuna gnomo ankaŭ pardonos ĉiujn stultaĵojn, kiujn li diris pri la donacoj, kiujn la organizo ricevis por savi la arbarojn. Glogo ekstaris en sia korbo kaj dankis al Rodney tre ĝentile, kaj Rodney laŭtlegis la telegramon.

"Mi deziras donaci la abisenajn reĝajn anserojn al via organizo. Ili estu vendotaj per aŭkcio je favoro de via agado. Vi estas petataj afable sendi reprezentanton al gazetara konferenco en Imperia Hotelo hodiaŭ je la kvina posttagmeze."

Poste sekvis kroma telegramo, adresita al aŭkciisto, kies nomon Rodney trovis en San Franciska gazeto. Tiu estis ankaŭ invitita ĉeesti la gazetaran konferencon, kaj Rodney diris, ke li certe venos, ĉar aŭkciistoj vivas per publika renomo. Ĉe la granduloj famo signifas monon, li klarigis. Kaj mono estas io, da kio la granduloj neniam povas ricevi sufiĉe.

Glogo ekĝemis kaj retiris sin al sia korbo, kie li estis forte atakita de sia neŭrastenio.

*Tradukis* **Runo Stridell**

# Iun vi devas ami

*Iun vi devas ami,*
*eĉ se nur herbojn, riveron, arbon aŭ ŝtonon,*
*la manon vi devas apogi sur ies ŝultron,*
*por ke ĝi, malsata, satiĝu ĉe la tuŝo,*
*al iu vi devas, devas,*
*tio estas kiel pano, kiel akvogluto,*
*devas doni viajn blankajn nubojn,*
*viajn sentimajn sonĝbirdojn,*
*viajn timemajn nepovbirdojn*
*— ie devas esti por ili*
*nesto kun paco kaj tenero —*
*iun vi devas ami,*
*eĉ se nur herbojn, riveron, arbon aŭ ŝtonon —*
*ĉar arboj kaj ŝtonoj konas solecon*
*— ĉar la paŝoj ĉiam daŭrigas la vojon,*
*eĉ se ili haltas por momento —,*
*ĉar rivero konas malĝojon*
*— se ĝi nur kliniĝas sur sian profundon —,*
*ĉar ŝtono ekkonis doloron*
*— kiom da pezaj piedoj*
*jam iris sur ĝia muta koro —,*
*iun vi devas ami,*
*iun vi devas ami,*
*kun iu vi devas iri*
*la saman spuron —*
*ho herboj, rivero, ŝtono, arbo,*
*silentaj kunirantoj de soluloj kaj stranguloj,*
*bonaj grandaj estaĵoj,*
*kiuj ekparolas nur,*
*kiam homoj eksilentas.*

**Ivan Minatti**

*El la slovena tradukis* **Franko Luin**

VALDEMAR LANGLET

# Ĉe Tolstoj en Jasnaja Poljana

*Valdemar Langlet plurfoje vizitis la rusan verkiston Lev Tolstoj. Plej detale li skribis pri tio en sia libro* Till häst genom Ryssland. *Jen kelkaj paĝoj el tiu libro.*

*Parto de ĉi tiu traduko jam aperis en* pretere *(esperanto.nu/pretere) kaj la tuta ĉapitro aperos en la ampleksigota versio de la elektronika libro* Vojaĝimpresoj, *kiu enhavas la vojaĝpriskribojn, kiujn V. Langlet skribis originale en esperanto.*

Jam estis pli malfrue en la tago. La suno staris pli alte, la birdokantoj iom post iom ĉesiĝis, la vento ne plu susuris, sed la insektoj sur la tero zumis, saltis, kuris kaj rapidis tien kaj reen en la varma sablo ĉe miaj piedoj, pli kaj pli vigle. Mi leviĝis kaj daŭrigis mian promenon.

Mian vojon krucigis la granda ŝoseo, kiu iras de Tula suden al Voroneĵ. Tie mi renkontis rusan pastron veturanta kun sia familio. Ĝentile, sed ne sen ioma ironio, mi demandis lin pri la vojo al la domo de Lev Tolstoj.

"*Vot tam Jasnaja Poljana,*" li respondis ĝentile kaj montris al arbokovrita altaĵo en la proksimeco. "Tie ĝi estas," kaj li aldonis plurajn informojn pri la mallonga vojpeco, kiu restis.

Mi dankis, levis mian svedan studentan ĉapon pli alten ol mi iam antaŭe faris por rusa ortodoksa pastro, kaj daŭrigis. Unue preter agrabla pinarbareto kaj malnova memorŝtono kun ĉizelitaj blazonoj – tio estis limmarko inter Jasnaja Poljana kaj la najbaroj – poste sur malgranda ponto kaj preter vasta fruktĝardeno kun disfalanta pavilono sur monteto en angulo. Baldaŭ mi staris ĉe du grandegaj muritaj kolonoj de latispordo, el kiuj unu enhavis ĉambron, kiu evidente estis uzata kiel kokinejo. Maldekstre kuŝis la vilaĝo Jasnaja Poljana, ordinara rusa vilaĝo kun malgrandaj grizaj dometoj el ligno aŭ argilo; rekte antaŭen estis longa aleo de altaj poploj kaj aceroj, dekstre la fruktoĝardeno kaj duonsovaĝiĝinta parko, kiu etendiĝis je ambaŭ flankoj de la impona kaj pli frue certe bone prizorgata aleo.

Mi iris malrapide sur ĝi, scivolema kiel oni akceptos min, ĉar mi venis tute neinvitita, sen rekomendoj kaj nur kun referenco al rapidaj konatiĝoj dum mia pli frua vizito.

Je la fino de la aleo mi trovis tenisejon, evidente ofte uzatan, poste iom "sovaĝan" ĝardenon, kaj post ĝi la simplan blankan duetaĝan domon, kie Lev Tolstoj loĝas somere kun sia familio. Sur la balkono en la supra etaĝo aperis longa, maldika figuro kun larĝaj, rektaj ŝultroj kaj ondiĝanta longa, griza barbo – estis la maljuna grafo mem, faranta sian matenan gimnastikon en la sunlumo.

Ĉe la matenmanĝa tablo, kiu estis pretigita en la korto sub grandega arbo, mi trovis junan viron, kiu prezentis sin kiel kamarado de la plej juna filo de Tolstoj. Mi donis al li mian vizitkarton, sur kiun mi, por pli bona efiko, skribis en la internacia lingvo Esperanto: *Amiko de Tregubov kaj Puĉkovski*, du sindonemaj adeptoj de Tolstoj, kiuj en la antaŭa okazo prezentis min al la grafo.

Post kelkaj momentoj mi havis la plezuron vidi la grandiozan, de jaroj ankoraŭ ne kurbitan figuron renkonti min ĉe la pordo. Li akceptis min kun afabla kaj natura amikeco kaj certigis ĝentile, ke li bone memoras mian antaŭan viziton ĉe li en Moskvo. Antaŭ ol mi povis diri ion plian, li demandis



min, ĉu mi volas partopreni lian rutinan matenbanon; nur nun mi rimarkis lian kostumon, kiu estis strangaspekta ankaŭ por tiu, kiu bone konis liajn simplajn kutimojn – ĝi nome konsistis el nenio alia ol paro da simplaj pantofloj kaj tualetrobo el maldika blua ŝtofo, tenata kune ĉe la zono per bantuko! Mi apenaŭ sukcesis pripensi la kuriozan bonvenigon, kiam mi jam estis ĉe la grafa banejo – lageto en la parko, plenkovrita per "akvotrifolio".

La "bandomo" estis plej eble primitiva, konstruita el maldikaj vergetoj kaj kanoj, kaj havis lokon por maksimume du aŭ tri personoj samtempe. La tualetado ne kaŭzis al mi pli da laboro ol al la grafo, ĉar mi intence vestis min tre simple, kaj baldaŭ ni ambaŭ plaŭdadis plenplezure inter la verdaj kreskaĵoj en la lageto, naĝante, snufegante kaj baraktante en la cetere relative klara akvo, gajaj kiel knaboj, kiuj forkuris de sia instruisto. Kiam la maljuna grafo leviĝis el la akvo kun la hararo kaj barbo plenaj de la verda akvotrifolio, li aspektis kiel maljuna akravida sed bonvolema Neptuno, kiu dum momento estis tentata junece ruli sin en sia propra elemento. Li ĝojis pro mia naĝado kaj volis poste, kiam mi elvenis el la akvo, ke mi montru ekzemplon de nia konata sveda gimnastiko, kion mi volonte faris, kontenta, ke mi dank'al la maljuna kapitano L. en Upsalo ne bezonis hontigi mian nacion en tiu rilato. Li volis tiam montri, ke liaj brakoj malgraŭ la sepdek jaroj ne perdis sian viglecon – kun la rezulto, ke li preskaŭ faligis la malstabilan bankabanon!

Dum la promeno reen al la domo kaj dum ni kune kafumis ĉe la tablo sub la granda arbo, mi apenaŭ povis imagi, ke tiu fortika, sana, gaja kaj ŝercema maljunulo, kiu nun estis antaŭ mi, povas esti la sama fervora, pasia, serioza moralapostolo kaj sama senindulge severa filozofo Tolstoj, kiun mi ekkonis en *Konfesoj* kaj *Kio estas farenda?*.

Kiam ni fintrinkis la kafon, la gastiganto sciigis, ke li estas ĝuste nun plene okupita per interesa verko *Pri la belartoj* kaj ke li dum sia plej bona labortempo, inter la 10-a kaj 2-a, lasas sin ĝeni nek de reĝoj nek de almozuloj. "Cetere," li aldonis kun ĝentila rideto, "vi devas esti laca post via promeno kaj la bano; mi petos, ke oni preparu por vi sofon en la malvarmeta pavilono. Post kiam vi dormis kiom longe vi deziras, vi povas promeni en la parko kun iu el la junuloj ĝis la 2-a horo, kiam ni tagmanĝos – poste ni povos paroli. Kaj ĝis tiam *Gute Nacht!*" li finis ridetante kaj iris.

* * *

La tagmanĝo pasis.

Ĝi daŭris longe – pli longe ol mi kredis de li, kiu laŭ la onidiroj prenis la kutimojn de la rusa kamparano kiel modelon. Kvar manĝopladoj kaj du servistoj por la servado – mi atente rigardis la grafon por vidi, kiel li reagas al tio. – Li tute ne "reagis", li sidis tutsimple kaj manĝis sian simplan verdsupon kaj alian manĝon, ankaŭ preparita el ĝardenaj produktoj – li estis vegetarano dum dek jaroj sen ke li, laŭ propra eldiro almenaŭ, fartu alimaniere ol bone. La multaj manĝopladoj estis por la gastoj kaj la familio,

*Fotis Valdemar Langlet*

kiu vivas laŭ la kutima vivmaniero de rusa nobela familio, eĉ se iom simpla.

Sed mi forgesis prezenti la familion — aŭ pli ekzakte ĝiajn ĉeestantajn membrojn.

Unue estis tie la grafino. Sofia, grafino Tolstoj, apartenas al nenobela germana familio, kiu longe loĝis en Ruslando; ŝi tial sentas kaj pensas kiel vera rusino. La loko, kiun ŝi havas kiel edzino de la plej granda verkisto de sia lando kaj niatempa plej fama personeco, ŝi certe pli bone plenumas ol iu alia. Kun speciala talento ŝi kunigas kaj plej eminentajn konojn kaj nekredeblan laborkapablon. Ŝia pozicio ankaŭ ne permesas mallaboremon, speciale pensante, ke ŝi interalie dum jardekoj funkciis kiel la sola sekretario de sia edzo. Kaj kion tio signifas komprenas nur tiu, kiu vidis la skribstilon de Tolstoj kaj konas lian manieron prilabori siajn manuskriptojn; kiam netskribitaj li korektas ilin sur preskaŭ ĉiu linio, ŝanĝas, forstrekas kaj reskribas; poste ili devas esti denove netskribitaj, denove korektitaj kaj tiel plu senfine. Kaj tiun laboron faris grafino Sofia. Oni asertas, certigante la veron, ke ŝi devis reskribi kelkajn el la verkoj de Tolstoj ne malpli ol dek kvin aŭ dek ses fojojn. Nun ŝi estas liberigita de tiu tasko, la grafo nome havigis tajpilon, sur kiu speciale dungita persono kopias la manuskriptojn. Ĉe la lasta nettajpado la maŝino liveras ses kopiojn en unu fojo, kio ebligas, ke la verkoj de Tolstoj povas aperi samtempe en rajtigitaj tradukoj en pluraj lingvoj. Oni vidas, ke la granda maljunulo, kun ĉiu sia malŝato de artoj kaj sciencoj ne malakceptas iliajn fruktojn.

Grafino Tolstoj montras sin iom nervoza, pro kio oni komence ne tre bone fartas kune kun ŝi, sed ankaŭ post relative malprofunda konatiĝo oni lernas taksi nekutime edukitan, inteligentan kaj noblan personecon. Ŝi neniam, kiel ankaŭ ne la ceteraj membroj de la familio, plene dividis la opiniojn de sia edzo dum la lasta fazo de lia vivo, eĉ se ŝi en multaj kazoj simpatias al ili. Ŝia pozicio pro tio fariĝis tre malfacila, kaj estas rimarkeble, ke nur virino kun speciala inteligenteco, takto kaj juĝokapablo povis elteni ĝin kiel ŝi faris. Ĉiuj ŝiaj infanoj ricevis la plej zorgoplenan edukon; la patro, tiel dirite, partoprenis en tio nur pasive. Ŝi prizorgis kaj daŭre prizorgas la eldonadon de la verkoj de sia edzo — Tolstoj ŝajnas nuntempe tute indiferenta al ĉiuj tiuj romanoj kaj rakontoj, kiujn la mondo admiras, kaj li faras nenion por ili. Ŝi havas grandan influon al la verkado de Tolstoj, nun eble malpli ol pli frue, ĉar ŝia prijuĝo ofte estis decida; estas, ekzemple, ŝia merito ke *Paco kaj milito*, la fama granda romano en kvar partoj, estis purigita de pluraj teruraj detaloj, krudaĵoj metitaj en la buŝojn de la personoj kaj scenoj, kiuj malfaciligus la ĝuadon de tiu verko ĉe bonkoraj homoj. "Mi mem ne legus la verkon," grafino T. diris foje al mi, "sen faligi larmoj pro doloro, indigno kaj humiligo flanke de mia sekso, kaj mi scias, ke neniu purkora virino povus fari tion; kial do ekskludi ĉiujn tiajn de ĝuado de verko tiel rava, tiel grandioza, tiel fiera kiel ĝi?" Tiam Tolstoj sekvis la konsilon de la edzino, sed alian fojon lasis ĝin sen konsidero — tiam estis kreita *Kreutzersonato*. "Mi neniam komplete legis tiun libron," la grafino diris dum konversacio, "kaj mi malamas ĝin; mi ne volas enmanigi ĝin al iu, kiun mi amas."

Tolstoj, en sia tutrusa, iom naiva senpripenso, ofte faras promesojn iudirekten, sen konsideri iliajn enhavon kaj eventualajn konsekvencojn. Jen kaj jen li pro sia afabla komplezemo al fremduloj, kiuj ne ĉiam uzas tion diskrete kaj takte, venis en malplezurajn situaciojn, kiuj solviĝis nur pro la saĝa kaj energia interveno de lia edzino. Pri unu tia okazaĵo oni iam rakontis al mi en la tolstoja hejmo tiamaniere.

T. skribis artikolon pri temo, kiu igis lin akre ataki plurajn aŭtoritatojn, instituciojn kaj cirkonstancojn en Ruslando. Kontraŭkutime la manuskripto ne trapasis la "hejman" cenzuron, antaŭ ol ĝi estis sendita por preso en renoma rusa revuo, sed la redaktoro de tiu revuo, saĝa homo kaj persona amiko de Tolstoj, laŭ propra iniciato entreprenis plurajn forstrekojn en ties intereso, pri kio la aŭtoro post pli posta pripenso sentis sin sufiĉe kontenta. Dumtempe juna anglo, ni nomu lin sinjoro C., iom malmodesta kaj tromemfida persono, sukcesis en nekonata maniero — supozeble per la preseja personaro — havigi al si la originalan manuskripton kaj baldaŭ li publikigis en anglaj gazetoj iom torditan kaj akrigitan tradukon de la jam akra originalo. Ĝi vekis grandan atenton; la caro mem kaj kelkaj ministroj publike eldiris sian miron kaj bedaŭron kaj riproĉis akre — kaj prave — kaj la tonon kaj la enhavon de la studo. La anglo, kiu embarasiĝis, tuj veturis al Jasnaja Poljana kun skribaĵo, kiu laŭ lia propra informo al Tolstoj nur enhavis kelkajn ĝentilajn vortojn pri li mem kaj lia agado, kaj postulis la subskribon de la grafo por poste publikigi la skribaĵon. Tolstoj en sia sensuspektema fido pretis jam skribi sian nomon sur ĝin, kiam la grafino envenis kaj petis, ke ŝi almenaŭ rajtu rigardi la paperon, antaŭ ol ĝi estos subskribita. La anglo fariĝis konfuzita kaj ekskuzis sin, ke la tempo ne permesas tian tralegon, ke li devas kapti trajnon k. t. p. La grafino klarigis same trankvile kaj tute ĝentile, ke li estos bonvena gasto en la domo por kiom ajn longa tempo, sed la skribaĵon ŝi *nepre* legos.

Ŝi ankaŭ legis ĝin — kaj disŝiris ĝin en pecojn antaŭ liaj okuloj! Ĝi nome enhavis, apud pluraj superlativaj vortoj pri sinjoro C., plenan certigon de Tolstoj, ke la traduko en la angla gazeto esprimas plej fidele kaj kontentige liajn pensojn pri tiu demando! — "Se tiu skribaĵo estus publikigita," la grafino diris al mi, "la reputacio de mia edzo estus ricevinta fortan baton; lin mem fakte tio ne ĝenas, sed tio ĝenas aliajn. — La anglo ne estis tre kontenta pri mi, kiam li forveturis," ŝi aldonis kun bela rideto.

Tiamaniere la edzino de Tolstoj multajn fojojn intervenis, ĉar lia intensemo unuflanke kaj lia trofidemo aliflanke kutimis meti lin en ĉagrenajn malfacilaĵojn. Laŭ ŝi mem ŝia influo en tio nuntempe estas minimuma, sed je almenaŭ unu okazo mi havis la ĝuon konstati la kontraŭon. Tolstoj montris al mi je unu okazo manuskripton de gazetartikolo, dirante, ke li volonte estus publikiginta ĝin, sed ne faris tion kaj metis ĝin flanken, ĉar la edzino malkonsilis. La grafino estis tiam forvojaĝinta, sed kiam ŝi kelkajn tagojn poste revenis el Moskvo, li venis al mi kaj diris, duonŝerce duonserioze. "Ŝi cedis nun — mi *rajtas* publikigi ĝin! — Nu ja, mi estus tamen farinta tion," li rapide aldonis, "se mi opinius tion korekta, sed estus ĉiam malplezura." Supozeble li timis, ke oni kredos, ke li estas sub la ŝuo de sia edzino. Tolstoj sub la ŝuo — tiu penso estas komika por ĉiu, kiu iom konas liajn verkojn kaj personecon.

Ĉar la grafino sidis vidalvide al mi ĉe la tablo sub la granda arbo en la korto, kie la tagmanĝo estis servata, mi havis bonan okazon observi ŝin. La alta, iom mallarĝa frunto, la grandaj, brunaj okuloj kun la rapida rigardo kaj cetere la tuta karaktero de la vizaĝo donas al ŝia personeco klaran esprimon de inteligenta forto, kiu mildiĝas iomete de, se mi rajtas tion diri, la "ĝentilaj" manoj kaj ioma plaĉa diketeco. La rapidaj, iom nervemaj movoj ŝajnis malkaŝi pro troa psika laboro iom trostreĉitan fizikon — opinio, kiu pli poste malpraviĝis. La grafino parolis rapide kaj plurajn lingvojn — jen ruse kun la filo Miŝa (Mihail) kaj lia instruisto, Basinov-speca, kiel leganto de Turgenjev tuj rekonus — jen france kun mi kaj la 14-jara filino Saŝa (Aleksandra) kaj ŝia franca guvernistino — jen angle kun la alia guvernistino. Ĉar krom tio la grafo parolis germane kun mi, fariĝis iaspeca malgranda babela konfuzo, kiu je unu okazo igis Tolstojon ekkrii: "Se ni ĉiuj, kiel nia gasto ĉi tie, farus al si la penon lerni kaj paroli Esperanton, tiam la tuto estus multe pli komforta!"

*El* **Till häst genom Ryssland**
*Tradukis* **Franko luin**

Esperanto just nu

Finns även som fristående blad
som kan hämtas gratis från
**www.esperanto.se/justnu**

@ just nu
Aktuellt från esperantovärlden

Nr 2 · 20 december 2001

## TIDIG ESPERANTOKONGRESS 2002

Den svenska esperantokongressen år 2002 äger rum i Västerås första veckoslutet i maj — 3, 4 och 5 maj. Man förbereder bl.a. en panelldiskussion (detaljerna är inte klara än), något i stil med diskussionen vi hade i samband med årskongressen i Katrineholm.

Medlemmar och klubbar som vill motionera till SEF:s årskongress ska göra det redan nu.

## "MANNEN SOM ÖVERVANN BABEL" I NY UTGÅVA

En fransk biografi om L.L. Zamenhof, "L'homme qui a défié Babel" av René Centassi och Henri Masson kommer ut i en ny utgåva i mitten av december, lagom till esperantisternas "bokens dag" den 15 december.

Samtidigt utkommer en esperantoversion av samma bok, "La homo, kiu defiis Babelon", i översättning av Philippe Combot och Georges Lagrange. Den franska versionen på 342 sidor kostar 29 euro, den på esperanto, 296 sidor, 26 euro.

Båda böckerna kan beställas från Libroservo de SAT-Amikaro, Bernard Schneider, 38, avenue de la République, FR-95320 Thais, Frankrike.

## KURSER VARJE MÅNAD I KAUNAS

I Kaunas, Litauen, i huset som en gång tillhörde Aleksander Silbernik, L.L. Zamenhofs svärfar, huserar ett Esperanto-Centro som varje månad anordnar välbesökta esperantokurser. I kursen som pågick under novembermånad deltog nära 100 personer, enligt vad en av lärarna, Jevgenij Gaus, rapporterar.

## SPRÅKFESTIVALER PÅ ALLT FLER STÄLLEN

För att avsluta det europeiska språkåret anordnar man i Scheveningen nära Haag i Nederländerna den 15 december en "språkmässa" (mässa som utställning, inte gudtjänst). Medlemmar från Esperanto Nederland finns givetvis med och informerar om esperanto (www.esperanto-nederland.nl).

## STÖTTESTENAR MOT ANTAGANDE AV NY EUROPEISK PATENTLAG

Grekland, Italien, Portugal och Spanien vägrar att skriva under en ny europeisk patentlag eftersom lagen förutsätter bara tre språk: engelska, franska och tyska. Sverige och de övriga nordiska länderna har lagt sig platt, som vanligt.

## "SEZONOJ" HAR FLYTTAT TILL KALININGRAD

Esperantoförlaget "Sezonoj" har flyttat från Jekaterinburg till Kaliningrad (p.k. 1248, RU-236 039 Kaliningrad, Ryssland). Som sin första utgåva efter flyttet kommer från förlaget en av E.T.A. Hoffmans berättelser i esperanto-översättning, "Konsilisto Krespel"("Rath Krespel" på tyska). Valet föll på Hoffman, eftersom denne är född i Kaliningrad (dåtidens Königsberg) för 225 år sedan. Berättelsen är översatt av Wolfgang Kirschstein.

## ESPERANTISTER MED I FACKFÖRENINGSRÖRELSENS DEMONSTRATIONER I BRYSSEL

Den 13 till 15 december planerar de europeiska fackorganisationerna med 80 miljoner medlemmar stora demonstrationer i Bryssel. Esperantister, främst SAT-medlemmar från Frankrike, kommer också att finnas på plats.

## SEF SKIPPAR TELEFAX

Esperantoförbundets styrelse har på sina revisorers inrådan beslutat att helt sluta med telefax och avbeställa abonnemanget. Meddelandeflödet har nästan helt övergått till epost. Telefonen, 08–34 08 00, kommer dock att fungera även i fortsättningen, liksom gatuadressen — Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm — för vanlig post.

## "EUROBABBLE" INTE I MINISTERNS SMAK

Den brittiske Europaministern Peter Hain kallar det engelska som används inom EU för "Eurobabble" ("eurosnack"?) och vill sätta stopp för det. Utrikesdepartementet har publicerat en lista med 300 mest avskydda uttryck och deras översättning till normal engelska.

## OM ESPERANTO PÅ INTERNET: ETT DOKUMENT PÅ PAPPER

Nu finns det ett dokument som man kan skriva ut för eget bruk eller för utdelning och som visar vad man kan hitta om esperanto på internet. Dokumentet finns, till att börja med, på esperanto, engelska och franska. Det finns på http://purl.org/net/panorama/unikode/reklamilo.html. Man vill gärna ha översättningar till fler språk.




FÖRENINGSBREV

Sten Svenonius
Vendelsfridsg 4C
21764 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

## UEA:S LEDNING PÅ OFFICIELLT BESÖK I KINA

Renato Corsetti och Lee Chong-Yeong, UEA:s ordförande resp. viceordförande var den 21 – 25 november på officiellt besök i Kina, för att få regeringens stöd för esperantoverksamheten i landet.

UEA-representanterna har träffat bl.a. Li Zhaoxing, förste viceutrikesminister. Med honom har de diskuterat de språkproblem som råder i internationella organisationer, särskilt FN och Unesco. Det kinesiska språket har visserligen officiell ställning i dem båda, men den är inte särskild stark. Därför har Renato Corsetti och Lee Chong-Yeong föreslagit att Kina tar initiativ till en ny, mera demokratisk språkordning. Ministern framhöll vikten att få det kinesiska språkets ställning stärkt, men lovade att titta på frågan.

Bättre resultat gav besöket hos Chen Haosu, ordförande i Kinas vänskapsförbund med andra folk (han har nästan ministerställning). Dennes far var framträdande esperantist och Chen Haosu själv är vice-ordförande i Kinas "Förening av esperantos vänner". Hans uppmaning var att fortsätta kontakterna med Kinas regering, eftersom "dörren är öppen". Han var medveten om svårigheterna att övertyga regeringkollegerna, men framhöll att Kinas officiella politik — att motverka en eller några länders hegemoni i världen, som landet tillämpar på det politiska och ekonomiska området — kunde lika väl tillämpas på det kulturella och språkliga.

## 23 000 UPPGIFTER I DATABASEN

Internacia Esperanto-Muzeo Wien har i databasen om sitt bokbestånd numera 23 000 poster. Databasen är sökbar på internet genom www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm.

Antalet sökningar räknas och påverkar statsanslagen till IEMW.

## AUSTRALIENSARE TAR ÖVER I UEA

William Trevor Steele heter den nye t.f. generaldirektören i UEA. Han kommer från Australien och är känd författare. Hans förordnande är begränsat till ett år, under vilket styrelsen får hitta en långvarig ersättare.

## UK GÖTEBORG 2003: ARBETE PÅGÅR

29 november–2 december fick Göteborg besök av Nikola Raŝiĉ, UEA:s kongressekreterare. Han besökte Göteborg för att förbereda inför världskongressen 2003. Under två dagar talade han med representanter för Svenska Mässan och Göteborg&Co., tog kontakt med ett flertal hotell, etc.

På lördagen hölls ett möte med LKK, den svenska kongresskommittén.

Om kongressförberedelserna kan man läsa kontinuerligt på http://lkk-gotenburgo.gq.nu.

## RADIO BEIJING OCKSÅ PÅ INTERNET FR O M NÄSTA ÅR

Radio Beijings utsändningar på esperanto kommer under år 2002 även på internet, på ett likande sätt som Wienradions program (http://roi.orf.at/esperanto). Med en sådan lösning kan lyssnaren själv bestämma tidpunkten när han eller hon vill avlyssna programmen.

## VECKOSLUTSKURSER I STOCKHOLM

Verksamheten med veckoslutskurser i Stockholm fortsätter under år 2002. 26–27 januari ordnar man en nyborjarkurs, följd av en fortsättningskurs 9–10 februari. Roland Lindblom tar emot anmälningar, tel. 08–777 41 75. Han efterlyser också en medlärare, eftersom Nils Erik Kristoferson, mångårig medhjälpare, avlidit i höst.

## STARTPAKET KAN LEDA TILL KURS

Med början 1999 annonserade SEF på sin hemsida att det finns ett "paket" för självstudier och att priset innefattar medlemsskap under det år då paketet köps.

Under 2001 har det sålts 28 paket à 360 kr. Intressant är att flertaler beställare är högskolestuderande; flertalet hade funnit esperanto på nätet och det hade räckt för att fatta beslutet om ett köp.

En högskolestudent i Gävle, Per Blomberg, köpte sitt paket i februari. I september hörde han av sig och meddelade att han nu startat en kurs med 10 deltagare, med några från skolan. En kvinna i Sandviken, som förra året gick kursen i Karlskoga hos Lars Forsman, deltar som assistent till Per.